

## 6000–7999 paŝoj – 4 baladoj

& Sigurda balado:.....	697
& Valdemara balado:.....	710
& La bapto de caro Vladimir:.....	733
& Vojaĝoj kaj aventuroj de sinjoro Longkrurulo:....	755

## & Sigurda balado:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 6600 paŝoj dum 1 horo kaj 2-9 minutoj. Norda Kantaro #4401, la unua parto el kvar. Klarigojn (\*) vidu post la strofoj.>

### (#Melodioj:

<1,6-1,8:37> (

(# Varianto A: /mimi mire doTi LalSo; LaTi dore mimi; mimi lala la ti; tila sofa mimi; (#Rekantaĵe: mi mifa mi mire do La; LaTi doTi do rere mi mi; lala lala sofa mi; mi mifa mi mire do La; VoVo))?)

(#Strejmoja: /mimi mimi mimi mi; dodo dore mimi; mimi lala la ti; tila sofa mimi; (#Rekantaĵe: mi sofa mi mido Ti La; LaTi doTi do dore mi mi; lala lala sofa mi; mi sofa mi mido Ti La; h))?)

(#Suduroja: /mire mire doTi LalTi ; dodo dore remi; mifa somi so la; lala laso sofa; (# Rekantaĵe: mi sofa mi dodo Ti La; LaSi LaTi do dodo re mi; mila lala laso so; mi sofa mi dodo Ti La; mimi)) )×168 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Forĝisto Regin:

'1 /Ĉu vi volas aŭdi nun ; kion ĉi mi kantas ; pri la riĉaj reĝoj ; mi nun ek rakontos.

(×: **Griz portis oron de l' sablo\***. ; **Glavon svingis li kun kapablo.** ; **Sigurd venkis drakon ja.** ; **Griz portis oron de l' sablo.**)

'2 Sigmund, tiel nomas mi ; de l' jarlo filon ; estis la juna Hjordis, ; ŝi lia edzino. ....

'3 Tiel gaje trinkas ili ; en la jula festo ; kaj tiel klare sidas ili ; seĝojn de altkresto. ....

'4 Malpaco iris ; al la granda halo ; kaj tiel ĝi fortiĝis en ; de riĉa reĝo valo. ....

'5 Tiam estis multe jen ; el riĉa homa rando ; malpaco iris al ; de riĉa reĝo lando. ....

'6 Malpaco iris ; en riĉan reĝan landon ; metas ili sian batalon ; sude ĉe maran strandon. ....

'7 Rajdas ili al batalo ; suden sur la strandon ; bravaj fortaj gardis ili ; riĉan reĝan landon. ....

'8 Metis siajn boatojn ; sude ĉe la strandon ; tiom ruze gardis ili ; riĉan reĝan landon. ....

'9 Rajdas ili al batalo ; neniu venas re ; poste vivas Hjordis ; en malĝojo tre. ....

'10 Rajdas ili al batalo ; venas vivofino ; poste vivas Hjordis ; Sigmunda edzino. ....

'11 Hjordis ŝultras sin ; per blumantelo ; iris sur la kampo antaŭen ; al Sigmund celo. ....

'12 "Kuŝu sana Sigmund nun ; mia kara ; estas mi en malĝojtempo ; vin viziton fari. ....

'13 Aŭdu alta Sigmund ; mia kara ; ĉu kuraca estas io ; por viaj vundoj bara?" ....

'14 "Malfrue por vi Hjordis ; jen konsilan fundon ; al mi donu balsamon ; kuracan por mia vundo. ....

'15 Hunding-filoj en luktobruo ; faris vundon ĉi ; estis veneno en la glavo ; ili portis kontraŭ mi. ....

'16 Kiam al mi venis unua ; vunda tru' ; rompiĝis mia glavo ; en pecojn du. ....

'17 Kiam al mi venis ; dua vundo ; malbone apud koron ; hakas al profundo. ....

'18 Prenu vi ĉi tiujn ; glavpartojn du ; ilin al forĝejo ; portu la filo plu. ....

'19 Kion vi havas en utero ; estas knaba homo ; vi nutru lin al bona forto ; kaj donu Sigurd nomon. ....

'20 Pri filo nun jen ; por vi mia vorto: ; ĉi tiu sama filo ; venĝu mian morton. ....

'21 Regin forĝisto loĝas ; ĉe venonta flu' ; al li vi portu ; ĉi glavpartojn du. ....

'22 Forĝu glavon li el ĝi ; brilan en fasono ; ambaŭn fendi povu ĝi ; feron kaj ŝtonon.

'23 Akra nomiĝas drako ; kuŝas Brilerike ; Regin estas bona forĝisto ; perfidas li praktike. ....

'24 Mi ne povas Hjordis ; longe paroli vin ; jen devas esti mortmomento ; nun venanta min." ....

'25 Turnis ploranta Hjordis sin ; de Sigmund for ; ĉiuj ŝiaj domaninoj ; staris ĉe ŝi deĵore.

.....

'26 Ĉiuj ŝiaj domaninoj ; apud ŝi lojalis ; kiam edzino Hjordis ; senkonscion falis. ....

'27 Tiam kiel ofte plu ; venis ĝi en hasto ; reĝo saman nokton ; serĉis Helon\* gasto.

.....

'28 Ne malpli ol tiam volis ; Hjordis kostojn savi ; al la ondoj ruĝan oron\* ; lasis al Sigmund havi. ....

'29 Al la ondoj ruĝan oron ; ŝi lasis al li spesi ; krucon el arĝento blanka ; signon por adresi. ....

'30 Oriente sub monteto kie ; knaboj ludas en lumo ; kadavron palan fosis ili ; malsupren en nigran humon.

.....

'31 Oriente sub monteto kie ; knaboj venas paroli ; malhelas ĉi tenebran tagon ; malsupren en humon soli. ....

'32 Ploranta nun iris Hjordis ; en sia halo sidi ; Hjalprek reĝo unua estis ; vidvinon jen viziti.

.....

'33 Sigmund reĝo ; de Hjordis iris ; Hjalprek reĝo ; poste ŝin akiris. ....

'34 Hjalprek reĝo ; de l' jarlo filo ; li nun ricevis, ; altrangan edzinon. ....

'35 Graveda la edzino iras ; longe naŭ monatojn ; ĝis venis tiu moment' ; ŝi naskas filon ŝatan. ....

'36 Graveda la edzino iras ; naŭ monatojn konajn ; ĝis venis tiu momento ; ŝi naskas filon bonan. ....

'37 Tiam kiel ofte plu oni ; kaŝas malfacilon ; iris edzino al alta ĉambro ; kaj naskas junan filon. ....

'38 Ŝi vestas lin per ŝtofoj bone ; kiam li venis en domon ; Sigurd tiel petis ŝi ; por bona knabo nomon. ....

'39 Tielis pri Sigurd ; multis lia kresk' ; pli li kreskis en monato ; ol aliaj infanoj en ses. ....

'40 Kreskis li ĉe sia panjo ; kaj sen ambigu' ; pli li kreskis en monato ; ol aliaj en dek du. ....

'41 Kreskis li ĉe sia panjo ; ŝi donis al li progreson ; lernis li pli en unu monato ; ol aliaj infanoj en ses. ....

'42 Kreskis li ĉe sia panjo ; fortis evolu' ; pli fortiĝis en monato ; ol aliaj en dek du. ....

'43 Kreskis li ĉe sia panjo ;  
bonis lin fortun' ; pli li gajnis  
en monato ; ol aliaj en dek du.

'44 Kreskis li en tiu regn' : als  
viro de domin' ; Hjalprek reĝo  
; edukis lin. ....

'45 Kreskis li en tiu regno ;  
rapide kaj ne lante ; fariĝis liaj  
hakoĵ pezaj ; reĝajn virojn  
batante. ....

'46 Li elstaris en ludkampo ;  
sub la ŝildo ruĝa ; lernis ĉiun  
ruzon kiun ; oni konkurse  
juĝas. ....

'47 Li elstaris en ludkampo ;  
en konkursabundo ; ĉiam kiam  
ili pretis ; estis multaj vundoj.  
.....

'48 Li elstaris en ludkampo ;  
en hero-duel' ; ŝiras grandajn  
kverkotrunkojn ; sendas  
kelkajn al Hel. ....

'49 Sidigas la fraŭloj sin ;  
koleraj ili estis ; "Vian prefere  
venĝu patron ; ol tiom nin  
molesti." ....

'50 Sigurd ĵetas ŝildon ruĝan ;  
malsupren al la tero ; aŭdinte  
morton de sia patro ; nigriĝis  
li en kolero. ....

'51 Ĵetas glavon kaj  
luktvestojn ; ne plu lin amuzas  
ludo ; kaj eniras al sia patrino ;  
kun vangoj en pala ruĝo. ....

'52 Knabo iras al panjo sia ;  
parolas en rekta elano ; "Diru  
min pravon patran, ĉiu ;  
scivolas pri sia klano. ....

'53 Nun aŭskultu bona panjo ;  
diru el emajlo ; vivon de patro  
ĉu prenis iu ; aŭ mortis li sur  
pajlo\*? ....

'54 Aŭdu mia bona patrino ;  
demandas mi al vi ; ĉu mia  
patro veka venkiĝis ; kaŝe  
estas al mi. ....

'55 Aŭdu bona mia patrino ;  
veron diru al mi ; kies estis tiu  
nomo ; venkis patron li? ....

'56 Aŭdu mia bona panjo ;  
diru al mi de l' benko ; ĉu li  
ankoraŭ estas monde ; kiu  
patron venkis?" ....

'57 "Se en mondo pluas kiu ;  
vian patron venkis ; estos ne  
dum vivas vi ; ke li vin  
rekompensas. ....

'58 Mi ne povas pli vere ; ol ĉi  
diri vin ; tiuj estis Hunding-  
filoj ; kiuj venkis lin. ....

'59 Tiuj estis Hunding-filoj ;  
kiuj venkis lin ; estos ne dum  
vivas vi ke ; ili kompensas  
vin." ....

'60 Sigurd respondas al  
patrino ; pove laŭ siaj sentoj ;  
"Ofte kreskis al juna hundo ;  
buŝe akraj dentoj." ....

'61 Hjordis iras al la kestoj ;  
ĉiuj en ora garno ; "Jen vi  
vidas batalvestojn ; de via  
patro en armo." .....

'62 Ŝi malŝlosas la kestojn ;  
kun ora atribuo ; ŝi elprenas la  
glavpartojn ; kaj ĵetas al  
Sigurd-genuo. ....

'63 Ŝi elprenas la ĉemizon ;  
tute sangmakulan ; "Jen vi  
vidas, bona filo, ; vian patran  
tumulon." .....

'64 Ŝi malŝlosas la keston kie ;  
oro kaj aĵoj sekretas ; prenas  
tiun sangan ĉemizon ; kaj al  
lia genuo ĵetas. ....

'65 Prenas ŝi la glavpartojn ; al  
Sigurd donas ŝi ; "Donis via  
bona patro ; ja multan bonon  
al mi. ....

'66 Prenu vi ĉi tiujn ;  
glavpartojn du ; lasu forĝi ilin  
al ; sambona substitu'. ....

'67 Regin forĝisto loĝas ; ĉe  
venonta flu' ; al li vi portu ; ĉi  
glavpartojn du. ....

'68 Al li venigu vi ; ĉi  
glavpartojn du ; forĝu li bone  
kaj valore ; ĝis vi rajdos plu.  
.....

'69 Akra nomiĝas drako ;  
kuŝas sur Brileriko ; Regin  
estas bona forĝisto ; perfido  
lia praktiko. ....

'70 Iru al rapidfluo, vi ĵetu ;  
ŝtonon en riveron ; tian elektu  
ĉevalon kun ; malfuĝa  
karaktero." .....

'71 Iris al rapidfluo, li ĵetis ;  
ŝtonon en riveron ; tian elektis  
ĉevalon kun ; malfuĝa  
karaktero. ....

'72 Li elektiĝis en la regno ;  
neniu lin egalas ; poste jam  
nomiĝis li ; Grizo, Sigurda  
ĉevalo.

'73 Frue estis en mateno ; mi  
memoru pove ; Sigurd celas  
trans riveron ; forĝiston Regin  
trovi. ....

'74 Sigurd saltas al Griza  
dorso ; mateno nuras novi ;  
poste rajdis li trans riveron ;  
forĝiston Regin trovi. ....

'75 Estis juna Sigurd ; rajdas  
al pordo kabana ; Regin ĵetas  
forĝaĵojn ĉiujn ; kaj prenas  
glavon en mano. ....

'76 "Aŭdu brava Sigurd ; vi  
estas kuraĝa viro ; vojaĝas  
kien vi ; kien rajda iro?" .....

'77 "Nun aŭskultu Regin ; ĉi  
tien mia iro ; forĝu por mi  
glavon nun ; jen mia deziro."  
.....

'78 "Estu bonvena, juna  
Sigurd ; min kara estas vi ; se  
restos en regno iom da tempo ;  
vi estu ĉi nokte ĉe mi." .....

'79 "Mi ne povas, forĝisto  
Regin ; resti jen ĉe vi ;  
mankos mi al Hjalprek reĝo ;  
el la kortumo ĉe li. ....

'80 Forĝu glavon vi por mi ;  
bonvalora afero ; ambaŭ  
fendos mi per ĝi ; kaj ŝtalon  
kaj feron. ....

'81 Forĝu glavon vi por mi ;  
brilan en fasono ; ambaŭ  
fendos mi per ĝi ; feron kaj  
ŝtonon." ....

'82a Regin je la glavo prenis ;  
metis ĝin sur ardon ; dek  
noktojn tenis ; li ĝin tie garde.  
.....

'82b Regin je la glavo prenis ;  
metis ĝin enflame ; dek  
noktojn tenis ; li ĝin ĉiam  
same. ....

'83 Dek noktojn tenis ; li ĝin  
ĉiam same ; tiam juna Sigurd  
for ; rajdinta estis jam. ....

'84 Frue estis en mateno ; suno  
brilas nove ; Sigurd saltas al  
Griza dorso ; forĝiston Regin  
trovi. ....

'85 Sigurd saltas al Griza  
dorso ; mateno nuras novi ;  
poste rajdis li trans riveron ;  
forĝiston Regin trovi. ....

'86 Estis juna Sigurd ; rajdas  
al pordo kabana ; Regin ĵetas  
ĉiujn forĝaĵojn ; kaj prenas  
glavon en mano. ....

'87 "Estu bonvena, Sigurd ;  
forĝis mi glavon ; se vin ne  
nocas menso kaj koro ; vi  
estos venkohava. ....

'88 Forĝis glavon mi por vi ;  
brilan en fasono ; ambaŭ  
fendos vi per ĝi ; feron kaj  
ŝtonon." ....

'89 Sigurd iras amboson  
grandan ; firma grundo atendis  
; rompe sian glavon ; en  
partojn du li fendis. ....

'90 "Morton de mi, Regin ; vi  
meritas ĉar ; min perfidi volis  
vi ; per via armilfaro." ....

'91 Ambaŭn prenas li  
glavpartojn ; ĵetas al lia sino ;  
tremis Regin forĝisto ; kiel  
lilifolio. ....

'92 Ambaŭn prenas li  
glavpartojn ; ĵetas al lia mano  
; tremis mano de Regin ; kiel  
lilia kano. ....

'93 "Forĝu vi alian glavon ;  
sed tiel forĝu ĝin ; sciu vi  
Regin ; vivo ne restos vin. ....

'94 Glavon vi faru tiom ; forta  
en tolero ; ambaŭn fendos mi  
per ĝi ; kaj ŝtalon kaj feron."  
.....

'95 "Forĝos mi alian glavon ;  
estos ĝi sufiĉe ; koron de la  
drako ; metos mi kondiĉe. ....

'96 Por vi juna Sigurd ; forĝos mi na glav' ; koron de la drako ; vi donu al mi por pag'." .....

'97 Regin je la glavo prenis ; metis ĝin enflame ; tridek noktojn tenis ; li ĝin ĉiam same. ....

'98 Tridek noktojn tenis ; li ĝin ĉiam same ; tiam juna Sigurd for ; rajdinta estis jam. ....

'99 Sigurd saltas al Griza dorso ; mateno nuras novi ; poste rajdis li trans riveron ; forĝiston Regin trovi. ....

'100 Estis juna Sigurd ; rajdas al pordo kabana ; Regin ĵetas ĉiujn forĝaĵojn ; kaj prenas glavon en mano. ....

'101 "Estu bonvena, Sigurd, ; kia via atendo? ; bonan havos vi superon ; laŭ ĉies rekomendo. ....

'102 Estu bonvena, Sigurd ; forĝis mi na glav' ; se vin ne nocas menso ; vi vaste vojaĝos brava. ....

'103 Forĝis glavon mi por vi ; brilan en fasono ; ambaŭn fendos vi per ĝi ; feron kaj ŝtonon." .....

'104 Sigurd iras amboson, hakas ; ĉion en rigardo ; nek eltenas klaboroj nek traboroj ; al tiom glava hardo. ....

'105 Tiel hake li Sigurd ; forte batis ; fendis li amboson ; kaj la fundon dis. ....

'106 Kuras rivero el tiu fonto ; alia ĉe la flanko ; Gram nomas li glavon ; kuŝantan sur halplanko. ....

'107 "Aŭdu glora Sigurd, ; edzinon serĉas vi ; por simila ĉefo ; donos vivon mi." .....

'108 "Nun aŭskultu Regin ; ĉi tion vi diras al mi ; sed alio kuŝas koron ; forĝisto Regin, de vi." .....

'109 "Tion ĉi, brava Sigurd ; diru vi min ; kiam vi rajdos Brilerikon ; lasu min sekvi vin." .....

'110 "Unue rajdos mi aŭrore ; Hundingfilojn trovi ; poste rajdos mi Brilerikon ; memoron mi ŝatas kovi. ....

'111 Unue rajdos mi aŭrore ; Hundingfilojn faligos ; poste rajdos mi Brilerikon ; vi ne kun mi navigos." .....

'112 Estis Sigurd Sigmundido ; ne mankas al li bonsorto ; rajdis li tiam en aŭroro ; sin venĝis patran morton. ....

'113 Rapide li venkis Hunding-filojn ; revenis li poste fortika ; hastan horon restis li ; li rajdis al Brileriko. ....



'114 Ĉiujn venkis li Hunding-filojn ; venis li re sen piko ; mallongan tempon estis en regno ; li rajdis al Brileriko. ....

'115 Trompulo Regin forĝisto ; pensas mem en si ; "Celas vi al Brileriko ; vin postsekvos mi." ....

'116 Estis Sigurd Sigmundido ; rajdas trans arbaro ; lin renkontis maljunulo ; eksidis apud pado. ....

'117 Venis viro sur kampo antaŭen ; jam nenia rimarko ; vastan ĉapelon kape portis ; en manoj finna arko. ....

'118 Venis viro sur kampo antaŭen ; strebis li montorande ; havis okulon unun en kapo\* ; butonpantalono gambe. ....

'119 Estis la juna Sigurd ; al Brileriko kuras ; renkontis maljunan viron ; meze sur la spuro. ....

'120 Estis la juna Sigurd ; sursidis bonan ĉevalon ; tiel diris filoj al mi ; lin batis la fatalo. ....

'121 "Aŭdu Sigurd Sigmundido ; vi estas alta viro ; vojaĝas kien vi ; kien rajda iro?" ....

'122 "Unue mi rajdis al ŝilda bruo\* ; la Hunding-filojn trovi

; nun mi rajdas al Brileriko ; faman lukton provi." ....

'123 "Aŭdu alta Sigurd ; diru vi al mi ; kiu estas malgranda homo ; sekvanto jen kun vi?" ....

'124 "Forĝisto Regin li nomiĝas ; drakofrata viro ; ĉar mi havas lin ĉe mi ; dum ĉi tiu mia iro." ....

'125 "Kiu vin petis fosi ; du truojn ĉi ; morton tiu sama homo ; generis por vi." ....

'126 "Regin al mi konsilis ; fosi truojn du ; ĉar li estas mia amiko ; dum tiu ĉi veturo." ....

'127 "Se vin konsilis Regin ; fosi truojn du ; estas li fiperfidulo ; mortigi vin faros, nu. ....

'128a Bone Sigurd devas vi ; havi je atento ; ke ne donu al vi morton ; tiu ĉi serpento\*. ....

'128b Bone Sigurd devas vi ; gardi je atako ; ke ne donu morton al vi ; tiu granda drako. ....

'129 Fosu vi nun truojn du ; kaj trian apude, ho, ; efiko de l' veneno ; ĝin varmigu do. ....

'130 Fosu vi la trian ; vi fosu ĝin proksime ; efiko de l' veneno ; fortigos vin anime. ....

'131 Fosu vi truojn kvar ; se lacigos vin atako ; gardos vi vin per tio kontraŭ ; venensango draka. ....

'132 Fosu vi la kvaran ; iom pli longe for ; supren el la truo ; luktos vi lin rigore. ....

'133 Fosu vi la kvaran ; vi fosu ĝin apude ; poste vi Sigurd ; staru en tero kruda." ....

'134 Drako iris de la oro ; vasta famo deklaras ; Sigurd sidiĝas sur Griza dorso ; rajde sin preparas. ....

'135 Drako iris de la oro ; ŝajnas en sekuro ; Sigurd palpas vundosagon\* ; por glava proceduro. ....

'136 Tridekulna akvofalo ; sub ĝi kuŝis drako ; kapo kaj vosto sur la tero ; kuŝis kurbe lokon. ....

'137 Tridekulna akvofalo ; sub ĝi kuŝis drako ; supre estis ambaŭ bridoj ; kuŝis ventro lokon. ....

'138 Supris liaj ambaŭ bridoj ; sed ventro lokon kovis ; estis la brava Sigurd ; li sian glavon ŝovis. ....

'139 Estis rapida Sigurd ; glavon tiris en tru' ; buntan drakon fendis li ; en disajn partojn du. ....

'140 Sigurd donis hakon belan ; al ĉiuj tre mirenda ; tremis tiam frondfolioj ; kaj tuta mondetendo. ....

'141 Tremis tiam frondfolioj ; tuta mondetendo ; Sigurd per sia akra glavo ; hakis talion fende. ....

'142 Tiam drako demandis ; kiam li kuŝis rompe ; "Kiu estas la kuraĝulo ; hakanta tiom aplombe?" ....

'143 "Sigurd vi nomu min ; Sigmunda filo ; estis la juna Hjordis ; ŝi lia edzino." ....

'144 "Nun aŭskultu Sigurd ; kion mi diras al vi ; kiu vin sekvis vastan vojon ; tien ĉi al mi?" ....

'145 "Regin estas via frato ; voje li min gvidis ; li plej granda perfidulo ; mortigi vin avidis." ....

'146 Tion respondis drako ; en sange kuŝa stato ; "Mortigu vi forĝiston Regin ; kvankam mia frato. ....

'147 Venku vi forĝiston Regin ; kiel vi venkis min ; li plej granda perfidulo ; mortigi volis vin." ....

'148 Diris Regin forĝisto ; je sia intereso ; "Ĉu al mi nun Sigurd ; vi donos laŭ promeso?" ....

'149 Sigurd pikis al la koro ;  
kvankam vojo dura ; fritis ĝin  
sur stango ; tridek ulnojn  
mezura. ....

'150 Sigurd mane tro varmiĝis  
; tuj en buŝon tiris ; birdojn li  
kaj bestojn ĉiajn ; komprenis  
kion diris. ....

'151 Diris al li sovaĝaj birdoj ;  
sidis sur kverka branĉo ; "Por  
vi mem Sigurd ; estu viando  
manĝo." ....

'152 Sigurd rostis koron ; kaj  
tiris ĝin de l' stango ; Regin  
kuŝiĝis drinki ; el draka  
venensango.

'153 Regin kuŝis drinki ; el  
sango de la drako ; Sigurd  
morten vundis lin ; per tie  
stara hako. ....

'154 Estis la juna Sigurd ;  
glavon svingis plu ; poste li  
fendis forĝiston Regin ; en  
disajn partojn du. ....

'155 Multan oron povis tiam ;  
Sigurd ekposedi ; ĉar li venkis  
la buntan drakon ; kiu  
Brilerike predis. ....

'156 Frue estis en mateno ;  
ruĝas antaŭ suno ; ligas li sur  
Grizan dorson ; orkestojn dek  
duajn.

'157 Dek du orkestojn ŝarĝe ;  
li metis post akiro ; supre li  
eksidis mem ; laŭ onia diro.  
....

'158 Sin sidigas Sigurd ; rajde  
sur la meto ; Griza kuris sur  
erikejo ; tiam estis preta. ....

'159 Dek du orkestojn ;  
ambaŭflanke ŝarĝa ; kuris li  
trans Tilirojo ; famo min venis  
largâ. ....

'160 Griza saltis trans fosajon  
; rompiĝis rimeno ; kelkaj  
diris al mi tion ; estis  
fatalveno. ....

'161 Kuris ĉevalo en sovaĝejo  
; ne konis vojon ĝustan ;  
Sigurd dormis en tiu nokto ;  
sub malvarma arbusto. ....

'162 Tiel tretas Griza ; ebene  
ŝtonan valon ; Neniu venas tia  
poste ; en riĉan reĝan halon.  
....

'163 Nun baladon finos mi ; ne  
kantas mi jam favore ; poste  
ekos alian kanton ; kaj metos  
ĝin plu memoren. ...



25/15

.

## **,& Kanto de Brinhild:**

'164 Aŭdis rimbaladon mi ;  
faritan en pli verda lok' ; estis  
praunue ĝi ; ekis en Budla  
epok'. .....

'165 En pratagoj reĝo regis ; ni  
lin Budlo nomu, ; bredis  
bonan li filinon, ; naskita por  
sorto bona. ....

'395 Nun baladon finos mi ; ne  
kantas mi jam per favoro ;  
poste ekos trian kanton ; kaj  
metos ĝin plu en memoron.  
..... )

## <& Klarigoj al Sigurda balado:

Balado pri Sigurd Fafnon-mortiginto, forĝisto Regin kaj drako (aŭ "serpento") Fafno. Verkis verŝajne Johan Henrik Schrøter (iam ĉirkaŭ jaro 1820). El feroa tradukis Martin Strid (2014). La rakonto venas el Volsunga fabelo kaj estas ilustrita en ŝtonaj runskriboj kiuj aĝas mil jarojn. Sigurd nomiĝas feroe Sjúrdur (Sjeŭrur) kaj germane Siegfried ("Zigfrid"). Opiniis historiistoj ke li estis franko.

Al 131-strofa varianto el Strejmojo (Feroa Fluinsulo), interrete trovebla, ni aldonis 32 kromajn strofojn el 146-strofa varianto kiu estis notata en Sudurojo (Feroa Sudinsulo) kaj presata en 1822. Duoble tradukiĝis strofoj '82 kaj '128. Kaj la vortoj kaj la sinsekvo de la strofoj povas varieti.

Melodio #Strejmoja el centra Feroo kaj #Suduroja el feroa Sudinsulo.

Klarigoj (\*):

'1 Sablejo estas malfekunda tero, ofte landlima.

'27 Hel estas diino gardanto de la malhela kaj malvarma regno de morto.

'28 Funebra kutimo estis meti kadavron de estro sur ŝipon kaj bruligi ĝin sur maro kun valorajoj.

'53 Morti sur pajlo signifas morti hejme pro aĝo aŭ malsano, anstataŭ heroe-honore morti en batalo.

'118 Unuokuleco estas atribuo de ĉefdio Votano (Oðin).

'122 Ŝilda bruo: batalo.

'128a Serpento jen signifas drakon.

'135 Vundosago, metaforo pri glavo.

>

## & Valdemara balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 7482 paŝoj dum 1 horo kaj 14 minutoj. Klarigojn (\*) vidu post la strofoj.>

### (# Melodio:

<1,7:29> (/lala sofa fami mifa; sola laso fami; lala sofa remi fala; sofa fami mire;

(#Rekantaĵe: mifa so so; la3la lala lala lala so so; dodo dore mi; mifa so so)

)×258 )+

### (& Strofoj:

#### ,& Unua parto. Devenoj:

'1 /Venu jam kunigi nin ; en ĉendancon feroan\* ; ĉar ni historion konu ; kaj fieru heroan.

(×:; **Kantu forte ; frape paŝu dancon kaj ridetu ; belas nova tag' ; kantu forte.**)

'2 Nun aŭskultu jen baladon ; belan mi rakontos ; pri sinjoro kuraĝa kiu ; duran devon frontos. ....

'3 En Francujo hugenotojn\* ; reĝo persekutis. ; Fuĝis Langleoj de l' despoto ; kaj ekzilon salutis. ....

'4 En Svedujo poste loĝis ; bona arĥitekto ; ĉar lia prapatro fuĝis ; tien vivprotektan. ....

'5 Verkis fabelojn por infanoj ; kaj instruajn librojn ; fraŭlino Matilda\* kun elano ; voĉis amajn vibrojn. ....

'6 "En Sudermanlando\* vivas ; arĥitekto sperta. ; Estrajn domojn kaj preĝejojn ; li konstruis lerta. ....

'7 Por norvega parlamento ; Emil\* desegnis domon. ; Plu famigis teatrejo ; Dramen lian nomon." ....

'8 "Svaton jesu, edziniĝu ; al sinjoro Langleo ; ne pro riĉo kaj prestiĝo ; sed familia kreo." ....

'9 Spetebihale\* post la nupto ;  
hejmon faris ili ; vivis honeste  
sen korupto ; kvar ŝi naskis  
filojn. ....

'10 Frato Filip\* inĝeniero ;  
kun Nobel' laboris ; poste pri  
konstruteĥniko ; Stokholme  
profesoris. ....

'11 Frato Abrahamo\* ĥemion ;  
diligente studis. ; Profesoro  
heliuman ; pezon li konkludis.  
.....

'12 Frato Aleksandro\* artisto ;  
rajdi ĉevalon ŝatis ; pentris  
mondon de ekzisto ; povas mi  
konstati. ....

'13 Valdemar'\* plej juna filo ;  
de Emil kaj Matilda ; kreskis  
intelekte brila ; en homamo  
milda. ....

'14 En Polujo judo juna\* ;  
kreis novan lingvon. ;  
Varsovie li eldonis ; per doto  
tiun atingon. ....

'15 Libron cenzuristo rigardis ;  
en tempo de siringoj ; en la  
rusa, pola, germana ; franca  
kaj angla lingvoj. ....

'16 Unuan libron li al homoj ;  
diverslanden sendis ; kaj  
reagojn de ranguloj ; kun  
espero atendis. ....

'17 Lernis verkisto Tolstoj  
dum horo ; la gramatikon tute  
; kaj post studo duhora  
ankoraŭ ; komprenis absolute.  
.....

'18 Dekkvinjara Antonina\* ;  
Esperanton lernis ; ĉar ne volis  
venkon finan ; atendi ĝis  
eterne. ....

'19 Skribis ŝi leteron kaj ; al  
Zamenhofo sendis. ; Lin  
kortuŝis vortoj ŝiaj. ; Bone  
respondendis. ....

'20 "En Simferopolo instruas ;  
mi ĝin al kamaradoj. ; Pensoj  
homaranaj influas ; dum la  
lingva studado. ....

'21 Ni nun esperanton kune ;  
ku2n ĝojo lernas. ; Volas  
generacio juna ; vivi mondon  
modernan." ....

'22 Venis vortoj de la majstro ;  
ankaŭ al Upsalo. ; Otto\*  
ordiniĝis pastro ; en la  
katedralo. ....

'23 "Valdemaro, ho studanto ;  
de l' universitato\* ; lingvon  
rigardu Esperanton ; certe vi  
ĝin ekŝatos." ....

'24 Valdemar' kaj Otto  
Zejdlico ; studis la novan  
lingvon. ; Ĉiu poste en sia  
ofico ; bone sin distingis. ....



'25 Ili societon faris\* ; por lingvo Esperanto. ; elektiĝis Valdemaro ; ĝia prezidanto.

.....

'26 Ludoviko pensas pri ; homara paca pado: ; "Ĉu la lingvo internacia ; fariĝos monda movado?

'27 Mondolingvo Volapuko\* ; perdas da prestiĝo. ; decidis Nurenberga klubo ; esperantistiĝi\*. ....

'28 Volapukon trafis jam ; forlaso kaj disfalo. ; Klubon esperantan fondis ; junuloj en Upsalo. ....

'29 Dua klubo kaj unua ; por nur Esperanto, ; estu lumo por movado ; monde malgiganta."

.....

'30 "Kara mia edzo, vi ; ne estu maltrankvila. ; Vian lingvon lernas jam ; anaro tuj multmila." ....

'31 De Valdemara balado nun ; jen parton la unuan ; finas ni sed dancos kune ; baldaŭ\* la parton duan. ....

## **,& Dua parto.**

### **Ruslandon:**

'32 Jen Valdemaran parton duan ; kantos mi al vi tu2j. ; Valdemaro renkontis fruajn ; espojn en Rusu2j'. ....

'33 "Esperantistoj al Jalto venu!" ; anoncis Ilja Ostrovski\* . ; Pra-Pasportan Servon jenan ; devas mi agnoski. ....

'34 "En La Esperantisto\* amikojn ; lingvajn iu invitis" ; diris Valdemar' al Eriko\* ; "iru ni viziti. ....

'35 Kun kamaradoj mi jam fondis ; esperantoklubon. ; Tempas pri uzeblo respondi ; kaj forigi dubon. ....

'36 Planu ni vojaĝon kune ; trans la maro balta ; ek de Sankta Peterburgo ; ĝis la urbo Jalta." ....

'37 "Rusoj al Svedujo estas ; hereda malamiko" ; diris Eriko, "Ĉu atesti ; tion en praktiko?" ....

'38 "Malamikojn ĉu vi diru ; sed jen amikaro" ; diris Valdemaro, "Iru ; ni al Nigra Maro!" ....

'39 Iris ek sur longa vojaĝo ;  
du studentoj svedaj ; pro  
krimea espa mesaĝo ;  
amikecon kreda. ....

'40 Tra Finnlando li biciklis ;  
Sanktan Peterburgon. ;  
Esperanta parolo tiklis ; kun  
viro\* en tiu urbo. ....

'41 Esperanton Erik ne sciis ;  
eke ne parolis. ; Dum veturo  
lernis li ; ĉar komuniki volis.

'42 Ili veturis per fervojo, ;  
Moskvon rapidis ; gastis faman  
Lev Tolstojon\*. ; Lokaj espoj\*  
gvidis. ....

'43 Militon kaj pacon\*  
diskutis ; kaj cenzuron baran. ;  
"La Regno de Dio estas ene ;  
de vi,\* miaj karaj. ....

'44 Donu preter egoismo ;  
spacon al la amo ; kiel fortojn  
adicias; paralelogramo.\*" ....

'45 Valdemar' dankemas ĝoja ;  
pro la granda saĝo ; kiun  
dividis jen Tolstojo ; kaj  
kontente mesaĝas. ....

'46 "En Rusujo kun amikoj ;  
ni spertas unuan fojon ;  
internacian lingvaplikon ;  
poste daŭrigos vojon. ....

'47 Al Krimeo suna hastos ; ni  
trans montan alton ; ĉe Ilja  
Ostrovski gastos ; maran  
urbon Jalton." ....

'48 Antoninan Ilja vokis ;  
"Venu al gastoj montri ; la plej  
belajn krimeajn lokojn ; kaj al  
ili rakonti\*." ....

'49 En Krimeo kunestadon ;  
ĝuas tri semajnojn. ; Ĝis  
daŭrigas ili padon ;  
lingvofluon gajnos. ....

'50 De Sevastopolo ŝipiras\* ;  
ili konatan adreson ; de  
esperanta pioniro ; Borovko\*  
en Odjeso. ....

'51 Estis Nikolao la sama ; kiu  
el Varsovio ; ricevis la  
respondon faman\* ; pri  
Esperanthistorio. ....

'52 Li kaj Antonina jam gvidis  
; internacian voĉdonon\* ; kiun  
Odjesa klubo decidis ; pri  
reformpropono. ....

'53 Dankis pro tio Zamenhof' ;  
ke ili grave agis ; lin, estontan  
teozofon ; kaj ŝin, kiu ĉion  
pagis. ....

'54 Ĉiĉeronis Antonina ; kaj  
sen ajna dubo ; bone  
reprezentis sian ;  
esperantoklubon. ....

'55 "Valdemar', mi vidas ke ;  
vi ja ne estas danda. ;  
Eltriviĝis viaj ŝuoj ; pro  
paŝado planda." ....

'56 "Kun vi kara Antonina;  
urbon ni promenis. ; Multon  
interesan vidis ; ne piedojn  
trenis." .....

'57 Nikolaon Bo2rovkon;  
edziniĝis poste ; Antonina  
Ĉaikovska. ; Nupton ĝoje  
tostu! .....

'58 En Odjeso Valdemaro ;  
kun Vladimir Gerneto\* ;  
akordiĝis pri refaro ; de  
monata gazeto. ....

'59 "Ĉesis jam La Esperantisto  
; ĉar mono mankas. ; Da  
abonantoj longa listo ; novan  
eldonon dankus. ....

'60 Ĝi de Tolstoj publikigis\* ;  
verkon Prudento kaj kredo ;  
kio cenzuron rusan instigis ;  
ordoni ke ĝi cedu. ....

'61 La cenzuro esperanton ;  
eldoni malpermesis ; sed  
revuon en bona kvanto ;  
svedoj povus presi. ....

'62 Gazeton Lingvo Internacia  
; parte mi financos. ; Preso  
estu tasko via ; jen nia alianco.  
.....

'62 Per leteroj mi redaktos ;  
esperantogazeton. ; Eldonadon  
vi pritraktu ; ĝis dissendo  
pretos." .....

'64 "Gazeton Lingvo  
Internacia ; presos mi kaj  
eldonos" ; diris Valdemar',  
"kaj mi ; amikojn helpajn  
konas. ....

'65 Tiel glate ni evitos ; caran  
la cenzuron ; kaj forumon  
faros meritan ; por la nova  
kulturo." .....

'66 Ŝipon ili al Istanbulo ;  
serĉis el Odjeso ; sed  
ŝipestrojn ebriulojn\* ; volis tuj  
forgesi. ....

'67 Erik al maristo parolas ;  
"Serĉas ni ŝipon ; iri  
Konstantinopolon. ; Ĉu per  
via skipo?" .....

'68 "Nia ŝipestro kuŝas  
plankon ; eĉ ne povas stari. ;  
Brando ne estas lia manko" ;  
maristo fideklaris. ....

'69 Venis per rusa vaporŝipo ;  
Konstantinopolon. ; Ĉe  
Bosporo brilis urbaj ; turoj sur  
markolon. ....

'70 Aĥmed Paŝa\* ilin gastigis  
; ridis rondaventra. ; Grand-  
sinjoro de l' kortego ; montris  
kion li pentras. ....

'71 De l' maro laŭ Danuba  
Rivero ; ili du pluiris, ; preter  
ĝia Pordo Fera ; montojn  
verdajn miris. ....

'72 "Restu pli longe en  
Hungarujo!" ; Valdemaro  
proponis ; "Ne, ni hejmen iru  
tuje!" ; Erik lin admonis. ....

'73 "Budapeŝto min ravas  
plu!" ; Valdemaro vokis. ;  
"Via monujo havas truon!" ;  
lin Eriko mokis. ....

'74 El Upsalo venas gazeto ;  
Lingvo Internacia. ; En la tuta  
mondo aperas ; neniuj alia. ....

'75 Sur sin tiun taskon prenis ;  
Valdemar' Langle' ; doktoro  
Krikorc, Pol Nilen' ; kaj  
Alberj por ekspedo\*. ....

'76 Kvar klubanoj fondis ĝin ;  
kaj poste ili produktis ; dum  
kvar jaroj magazinon ; kiu  
lingve fruktis. ....

'77 Gazeton redaktas  
Vladimiro ; de distanco  
granda. ; Poŝti ĝin klubanoj  
iras ; por homoj diverslandaj.  
.....

'78 Nikolao trovis lokon ; en  
Sankta Peterburgo. ;  
Translokiĝis paro Borovko ;  
de lando de la sturgo. ....

'79 Al ili la revuon ; poŝto  
pakaĵe liveris. ; La Rusujan  
distribuon ; ili letere peris. ....

'80 Valdemaro pionira ; estas  
esperantisto ; kaj per spertoj li  
fariĝos ; bona ĵurnalisto. ....

'81 Valdemaran baladon ni  
jam ; finas parton duan ; kaj ni  
ĝian parton trian ; baldaŭ  
dancos bruan. ....

## **,& Tria parto. Revojaĝe:**

'82 Nun de Valdemara balado  
; kantos mi parton trian ; pri  
lia vojaĝado ; en mondo nia.

.....

'83 Al Rusujo rean fojon\* ;  
Valdemar' sopiras. ; Sanktan  
Peterburgan vojon ; li somere  
iras.

'84 Bonvenigis geborovkoj. ;  
En ŝia utero ; jam embriis\*  
Valdemara ; venonta  
amespero. ....

'85 Ĝojis Antonina kara ; kaj  
en ŝia sino ; kreskis jam por  
Valdemar' ; estonta dua  
edzino. ....

'86 "Aleksandro, frato mia ; vi  
ĉi tie restis. ; Ĉu Nobela  
ekspozicio\* ; tre sukcesa  
estis?" ....

'87 "Jes, mi la ornamojn faris ;  
pagon ricevis tu2j. ; Antonina  
la monon ŝparis ; ni iru al  
Italu2j\*." ....

'88 Post Rusujo Budapeŝten ;  
venis Valdemaro ; vidi  
grandan ekspozicion ; de  
hungara miljaro\* . ....

'89 Li en Lingvo Internacia ;  
skribas artikolojn ; espe pri  
vojaĝoj siaj ; kaj amikaj  
paroloj. ....

'90 Al Rusujo trian fojon ;  
Valdemar' sopiras. ; Sanktan  
Peterburgan vojon ; li somere  
iras\*.

'91 Por li stampis la sveda  
konsulo ; rekomendan leteron.  
; "Al ĉi tiu bona junulo ; fidu  
en aferoj." ....

'92 Li veturis per fervojo ;  
inter kamparanoj ; viziti  
grafon Lev Tolstojon ; en  
Jasnaja Poljana\* . ....

'93 Devis ŝanĝi vagonaron ; li  
en urbo Tula ; ĉe preĝejo  
renkontis paron ; povran  
ĉifonulan. ....

'94 Lev lin bonvenigis kore ;  
en sia vilaĝo ; kaj dividis kaj  
palacon ; kaj profundan saĝon.

.....

'95 Demandis li de Lev  
moralon ; post malvenko  
ŝaka\* ; "Kiel ĝuste agi sen  
falo ; en malĥristan vakon?

.....

'96 Mizerulan paron renkontis  
; mi ĉe preĝejo dorman. ; Riĉa  
mi junulo hontis ; pri almozo  
norma." ....

'97 Lev respondis kun okuloj ;  
fajrobriple viglaj ; "Ni ne  
kapablas vivi sanktule ; tio  
vivon siglas." ....

- '98 Sergej Aleksandroviĉ' ;  
tatarâ ĥana pranepo\* ; helpon  
al Valdemar' dediĉis ; sur  
kozaka stepo. ....
- '99 Juĝisto Dmitri Ivaniĉ'\* ;  
kaj vilaĝa atamano\* ; trovis  
por li taŭgajn kondiĉojn ; ĉe  
Filonovskajanoj\* . ....
- '100 Kun kozakoj vivi li volis  
; en maleleganto. ; Kun Sergej'  
kaj Dmitri parolis ; nur en  
esperanto. ....
- '101 Pluge, rikolte, draŝe  
laboris ; li ĉe kozakoj\* pene. ;  
Supon kaj nigran panon voris ;  
vekiĝis frumatene. ....
- '102 Rusan stepon sur ĉevalo ;  
Valdemar' vojaĝos ; post  
restado radikala ; en kozaka  
vilaĝo. ....
- '103 Sur ĉevalo Zakaulok ;  
rajdis li horizonten. ; Rusan  
kampanan gastamon ; ĉie li  
renkontis. ....
- '104 Sur Zakaulok rajdis al  
nordo ; li dum sunis kaj blovis  
; kaj ĉe ĉiu kampula pordo ;  
koran gastamon trovis. ....
- '105 Kampulojn, amikojn kaj  
princinojn ; gastis li sur vojo. ;  
Post riveroj kaj ravinoj ;  
revenis al Tolstojo. ....
- '106 "En mia dudekkvina jaro"  
; diris Valdemaro ; "rajdis mi  
kozakan ĉevalon ; ĝis Balta  
Maro. ....
- '107 Mi dum iro spertis  
pravon ; ke stampita letero ; al  
oficulo pruvas gravon ; de  
bezona afero." ....
- '108 Jarcentfinon esperanta ;  
unua edziĝo vestas. ; Signe  
Blumberj\* el Akvelando\* ;  
kaj Valdemaro festas. ....
- '109 "Mielmonate ni vojaĝu ;  
foran Samarkandon. ; Rusa  
registaro omaĝon ; donos tra  
la lando. ....
- '110 Pro letero de reĝo  
Oskaro\* ; nia grupo disponos ;  
tra imperio de rusa caro ; mem  
fervojevagonon. ....
- '111 Vi nin sekvu en vojaĝo ;  
frato Aleksandro. ; Bildojn  
pentru de vilaĝoj ; kaj riveraj  
meandroj." ....
- '112 Signe al li naskis filojn ;  
bele sane kreskis ; juna Lars  
kaj aĝa Emilo\* ; bone  
adoleskis. ....
- '113 En la granda imperio ; de  
la rusa caro ; fermentiĝas  
revolucio ; en la laboristaro.  
.....

'114 Valdemaro ĝin atestis ;  
en aparta libro\* ; kiel popolon  
trupoj molestis ; murde per  
kalibroj. ....

'115 "Se maltaŭga registaro ;  
civitanojn murdas ; al iliaj  
pledaj deklaroj ; oni restu  
surda." ....

'116 Fondon de sveda  
esperanto;federacio gvidis ;  
Valdemaro kaj sen vanto ;  
poste ĝin prezidis\*. ....

'117 Verkis Valdemaro pri ;  
milito en Balkano\*. ; Por la  
monda katastrofo ; estis ĝi la  
ĉano. ....

'118 En la mondmilito logis ;  
Finnlandon liberiĝi. ; Ilin  
Valdemar' apogis ; kampanjis  
li prestiĝe. ....

'119 Dum la rusa revolucio ; al  
finnoj libero venis. ;  
Valdemaro helpis tion ; kaj  
ricevis ordenon\*. ....

'120 Trian jaron de la paco ;  
mortis lia Signe. ; Vivo estas  
nur donaco. ; Enteriĝis digne.  
.....

'121 Valdemaro al Rusujo ;  
ĵurnaliste iras\*. ; Antoninan li  
renkontas ; ŝi problemojn  
diras. ....

'122 "Kara mia Nikolao ; patro  
ilia mortis ; kiu al ni  
vivsekuron ; kaj monon  
hejmen portis. ....

'123 Ĉu vi povas al Svedujo ;  
mian filinon preni ; ke mi  
povu la aliajn ; sola en vivo  
teni?"

'124 "Nina venu al Stokholmo  
; plu muzikon studi. ; Ĉe mi",  
diris Valdemaro ; "povos  
pianon ludi." ....

'125 Enamiĝis Valdemaro ;  
kaj la juna Nina. ; Ŝi fariĝis  
post du jaroj ; lia novedzino\*.  
.....

'126 Mi la trian parton nun ;  
rakontis Valdemaran ; kaj ni  
poste dancos kune ; ankaŭ la  
parton kvaran. ....

## **,& Kvara parto.**

### **Hungarlandon:**

'127 Nun mi kantos kvaran parton ; pri Valdemar' kaj Nina. ; Mondo tre malbone fartos ; pro malamo kulmina.

.....

'128 Lernis Esperanton frue; Valdemar' kaj regis. ; Li dek unu lingvojn flue ; kaj parolis kaj legis. ....

'129 Germanujon humiligis ; la venkintoj militaj ; kio kontraŭreagon instigis ; civilizon spitan. ....

'130 Eĉ pli Hungarujon rabis ; paco Trianona. ; Restis por miljara nabo ; lando nur triona\*. ....

'131 Rajdis Valdemar' ĉevalon ; tra hungara lando\* ; por ekkoni ĝin pli bone ; ol de fervojrando. ....

'132 En sia kvindeknaŭa jaro ; rajdis Valdemaro ; puston longe sur ĉevalo ; tra lando de hungaroj. ....

'133 Ekinstruis li svedan lingvon ; en universitato\* ; kaj studantojn judajn ŝirmis ; kontraŭ rasismaj batoj. ....

'134 Li en Budapeŝto laboras ; en lingva fakultato ; kaj rimarkas ĉe ĥristanoj ; mankon de kompatato. ....

'135 Post verkado, tradukado ; kaj kontakta kreo ; fariĝis li de l' ambasado ; kultura ataŝeo\*.

.....

'136 Adolf Hitler\* sen skrupuloj ; homojn tre malamas. ; Kontraŭ judoj, maldekstruloj ; amasparoloj flamas: ....

'137 "Judoj kaj ciganoj estas ; senvaloraj rasoj. ; El ili neniu restu ; pace ni ne lasu. ....

'138 Al ni arjoj\* ankaŭ slava ; raso malsuperas. ; Jes, la onidiroj pravas ; ili ne prosperos." ....

'139 Nazia partio sen kompatato ; homojn malestimas. ; Judoj, slavo, demokratoj ; regon ilian timas. ....

'140 Pli da teritorio postulas ; nazia retoriko. ; Libro brulas, kapoj rulas ; antaŭ la svastiko\*. ....

'141 Plojn Germanujo atakas\* ; grakas generaloj. ; Dua mondmilito diskalkas ; landojn al bataloj. ....



'142 "Diplomatoj sovetaj foriru!" ; Hungarujo postulas. ; Valdemar' eskortis ilin ; sekure ĝis Istanbulo. ....

'143 Hungarujo sendas trupojn ; lukti kontraŭ rusoj ; por eviti germanan okupon ; kiel aŭstroj\* ĵuse. ....

'144 Stalingradon germanoj tuŝas ; en batalo\* decida. ; Ilin de tie rusoj repuŝas ; okcidenten rapide. ....

'145 Martan tagon la nazioj ; faras hungare puĉon\*. ; Valdemaro vidas defion ; "Komenciĝos buĉo." ....

'146 Valdemaro kaj Per Anger\* ; en ambasado sveda ; antaŭvidis regi sange ; nazia murdobsedo. ....

'147 "Adolf Ajhmann\* el Germanujo ; venis forigon gvidi. ; Judojn li kolektas tuje ; sendos al perfido. ....

'148 Judojn for nazioj portas ; en tro malgranda spaco. ; En vagonoj centoj mortas ; pro premiĝo kaj laco. ....

'149 Mi ne mem atestis tion ; sed aliaj vidis ; kaj al ni rakontis ĉion. ; Dume neniu ridis. ....

'150 Al mi estis granda ŝoko" ; diris Valdemaro ; "Eĉ por turni sin mankas loko ; en malluma staro. ....

'151 Al mi estis forta skuo" ; diris Valdemaro ; "Eĉ por turni sin mankas truo ; en la densa staro. ....

'152 Malantaŭ ŝlositaj klinkoj ; en kunpremo merda ; plurajn tagojn eĉ sen trinko ; multaj prudenton perdas. ....

'153 Ĉu ni povas helpi homojn ; resti en sekuro ; kaŝi sin en ŝirmaj domoj ; for de sanga spuro?" ....

'154 "Mi pasporton doni povas ; se iu rilaton ; por si al Svedujo trovas ; ankaŭ nur privatan." ....

'155 Al Per Anger Valdemaro ; respondas per informo. ; "Necesas nun vivsava faro ; ekster kutima normo. ....

'156 Karlo Luc\* en ambasado ; svisa simile faras. ; Registaron li persvadis. ; Kartoj arestojn baras. ....

'157 Kaŝas li homojn de arestoj ; en eksa fabriko vitra ; ŝirmas ilin de molestoj ; kaj mortigoj arbitraj. ....

'158 Kaj mi tiel same faros ;  
kvankam kontraŭ juro. ;  
Homojn kaŝi ni preparos ;  
inter amikaj muroj." .....

'159 Diris Per aserton pravan ;  
"Helpu, jes, per domoj ; rajton  
vivi ĉiuj havas; homoj estas  
homoj." .....

'160 "Homoj estas homoj, ĉiuj  
; havu rajton vivi" ; diris Per,  
"Vi helpu al tiuj ; provu ni  
intensive. ....

'161 Certe ni ne povos ĉiujn ;  
savi de pereco" ; diris Per, "sed  
helpu tiujn ; provu per ĉiu  
ideo." .....

'162 Sagokrucanoj\* homojn  
ĝenas ; akre kaj minace. ;  
Valdemar' kaj Nina penas ;  
aŭdace kaj senlace. ....

'163 Valdemar' maljuna  
bravas ; kontraŭ ili kuraĝi. ;  
"Ili ne igu mortigejen ;  
homojn alvojaĝi." .....

'164 En sia sepdekdua jaro ;  
en ombro de milito ; taskon  
sur sin Valdemaro ; prenas  
teruron spiti. ....

'165 Valdemar' kaj Nina  
Langleo ; kaŝas multajn  
homojn ; ĉe amikoj malobee ;  
en privataj domoj. ....

'166 Helpas homoj al la paro ;  
en la savaj agoj. ; Multaj  
homoj ordinaraj ; laboras ja  
sen pago. ....

'167 Kelkajn kaŝas ĉe  
monaĥojn ; kelkajn en  
lernejoj. ; Ilin flegas kaj  
prizorgas ; kiom eblas pleje.  
.....

'168 Savoreta transporta servo  
; havas eĉ ŝarĝaŭton ; kaj  
kampare manĝaĵrezervon ; ne  
priparolu laŭte. ....

'169 Per hungara amikaro ;  
judojn save kaŝas ; ili kaj ĉion  
eblan faras. ; Morto strate  
paŝas. ....

'170 Nun de balado  
Valdemara ; kaj pri brava  
Nina ; finas ni la parton  
kvaran ; kaj tuj dancos kvinan.  
.....

## **,& Kvina parto.**

### **Ruĝakruce:**

'171 Finis ni la parton kvaran ;  
kaj nun ekas kvinan. ;  
Alparolis Valdemaron ; lia  
edzino Nina. ....

'172 "Grafo Folke Bernadot"\*  
novas ; en Ruĝakruca estraro.  
; Ĉu ni lin interesi povas ; veni  
ĉe hungarojn?" ....

'173 "Kara Nina, bona ideo" ;  
Valdemar' respondis ; " li  
estos brila korifeo ; Ruĝan  
Krucon fondi." ....

'174 Eksterlandan ministerion  
; Valdemar' entretis ;  
ĝeneralan sekretarion\* ; li  
renkonti petis. ....

'175 "Grafon akceptu  
Bernadoton. ; Helplaboro  
gravas ; Ruĝa Kruco Sveda  
fondota ; urĝe homojn savos."  
.....

'176 "Ne ricevus li permeson ;  
tra Germanujo veni ; sed mi  
pensas ke sukcesos ; vi la  
gvidon preni." ....

'177 "Tamen Ruĝan Krucon  
ĉu mi ; ankaŭ reprezentos ;  
por al homoj helpi dume ; en  
militaj turmentoj? ....

'178 Ruĝan Krucon certe mi  
do ; urĝe organizos ; por al  
homoj kun rapido ; doni  
vivprovizojn." ....

'179 Sur maljunajn ŝultrojn  
prenas ; Valdemar' la gvidon. ;  
Tio sagokrucanojn ĝenas. ;  
Planas ili perfidon.

'180 Sagokruco kaŝejojn  
serĉas ; por fuĝantojn trovi. ;  
Kaptatoj multajn larmojn  
verŝas ; ĉar sin kaŝi ne povis.  
.....

'181 "Homojn la nazioj kaptas  
; estas granda krizo. ; Kara  
Nina, ni adaptu ; nian  
organizon. ....

'182 Ĉi leterojn ni eldonu ;  
kvazaŭ fotan pasporton. ;  
Povas ĝi protekti homon ;  
kontraŭ bruta morto. ....

'183 Homon savos tia ĉi ;  
letero de protekto. ;  
Sagokrucano ne kuraĝos ; tiun  
jam difekti. ....

'184 Montris vojon Karlo  
Luco ; kiel deportojn eviti. ;  
Fridriĥ Born\* de Ruĝa Kruco ;  
age lin imitis. ....

'185 Konstantino Karadja\*  
rumano ; Anĝel Sanz-Briz\*  
hispano ; Anĝel Rotta\* de  
Vatikano ; laboras kun sama  
plano. ....

- '186 Jeson al kvarcent protektleteroj ; aŭtoritato donas ; kvankam eskapi de danĝeroj ; multaj pli bezonas. ....
- '187 Oficeje stampu paperojn ; kiel vivsavilojn. ; Ruĝakrucajn protektleterojn ; havu multaj miloj. ....
- '188 Al uniformulo ĝi ; imponos per bela stampo. ; Ĉu ĝi vere validas, tion ; kaŝu inter krampoj. ....
- '189 Oni dokumentojn respektos ; de Ruĝa Kruco Sveda ; juran bazon ne suspektos ; kaj arestojn cedos." ....
- '190 Sagokrucanoj leterojn grumblas ; de Ruĝa Kruco Sveda ; sed ne scias ke juro stumblas ; ilin validaj kredas. ....
- '191 Karlo Luc, Anĝelo Rotta ; Konstantino Karadja ; kaj Valdemaro judojn kvotas ; eviti regon sovaĝan. ....
- '192 Helpis al Anĝel Ĝorĝo Perlaska\* ; post la puĉo dua ; por ke protekto ne fiasku ; en batalo brua. ....
- '193 Koncentrejon Birkenaŭon ; du kaptitoj fuĝis. ; Ili raporton\* verkis baldaŭ ; kies mesaĝo muĝos. ....
- '194 Ĉasis ilin la nazioj ; veron por estingi. ; Tamen hungarajn judajn estrojn; tiu raporto atingis. ....
- '195 Juda kontraŭstara ligo ; volis ne paroli ; pri timiga koleriga ; aŭŝvicprotokolo. ....
- '196 Filip fon Frojdiger\* vokas ; "Legu jen raporton! ; Adolf homvaloron mokas ; puŝas nin en morton. ....
- '197 En la koncentrejo nazioj ; judojn amase gasas ; milojn mortigas pro nenio ; vivi neniun lasas." ....
- '198 "Montru!" Valdemaro diris ; "Jen do la fina flanko. ; Pri la judaj sortoj ni miris. ; Nun ni scias, dankon. ....
- '199 Ĉi raporton mi tradukos ; kaj al reĝo sendos. ; Gustav\* estas mia amiko. ; Ni reagon atendu." ....
- '200 Danielson\* ambasadestro ; ne raporton kredis. ; "Elrigardu tra fenestro ; maleblas tiel procedi. ....
- '201 Sesdek mil homojn jam ; en majo, ne povas esti. ; Demandu al registaro tamen ; ĉu oni tion atestis." ....
- '202 Valdemar' al oficiro ; petas klarigi ombron. ; "Ĝeneralstabano, ni miras ; ĉu ne troas ĉi nombro?" ....

'203 "Okdek mil homojn ili ;  
jam vagonare forportis. ;  
Ĉiusemajne dudek kvar mil ;  
pli dividas ĉi sorton." .....

'204 Fine Valdemar' sukcesas ;  
sendi la leteron. ; "Ho,  
Gustavo, mi promesas ; ke ĝi  
diras veron. ....

'205 Hajnriĥ Himler\* gvidas  
en regno ; judan finan solvon.  
; Ili laŭ la granda desegno ;  
fariĝos fumo kaj polvo." .....

'206 Skribis al Horti Mikloŝ  
Gustavo ; Valdemar'  
transdonis ; kaj parolis pri  
hasto grava ; al ŝtatestro  
imponis. ....

'207 "Horti, deportojn  
malpermesu ; el Hungarujo  
judajn ; ke amaŝtransportoj  
ĉesu ; kaj mortigoj krudaj."  
.....

'208 "Bone ke vi al mi venas ;  
kun ĉi reĝa mesaĝo: ; Ĝin mi  
serioze prenas ; kun registara  
engaĝo." .....

'209 Malpermesis registaro ;  
judojn fortransporti ; baldaŭ  
post la Valdemara ; pledo ĉe  
Mikloŝ Horti.

'210 Pro la reĝa telegramo ; de  
Gustavo Kvina ; ili ne sendas  
judojn al flamoj ; en bruligo  
fina. ....

'211 Skribas Valdemar' leteron  
; al Karlo\* princo. ; "Moŝto,  
helpon konsideru ; kontraŭ  
ekstermo grinca. ....

'212 Por la Ruĝakrucaj pagoj ;  
ni bezonas monon ; kaj pro  
multaj helpaj agoj ; pliajn kvar  
personojn." .....

'213 "Pensas mi, akceptu vi ;  
nespertan ĉi Raulon. ; Per vi  
ambaŭ ja evitos ; multaj  
homoj brulon." .....

'214 Venis Raul Valenberj'\* ;  
ĥaosan Budapeŝton ; kaj  
instruis lin Per Anger ; eluzi  
konsulveŝton. ....

'215 Rajtas Raul fari veran ;  
ambasadpasporton. ; Multajn  
li elskribas, homoj ; do  
eskapas morton. ....

'216 Raul' ricevis multan  
monon ; de judoj en Usono. ;  
Kredis rusoj do ke estis ; li  
usona spiono. ....

'217 Valdemaro de Ruĝa  
Kruco; neniun monon ricevis.  
; Kunlaborantojn preskaŭ  
ducent ; estri sen ĝi li devis.  
.....

'218 Savas Raulo per  
pasportoj ; nur ĉasatajn judojn.  
; Valdemaro savas ĉiajn ;  
homojn sen ekskludo. ....

'219 Kanto pri Valdemar' kaj  
Nina ; longe jam progresas ;  
jam ni dancis parton kvinan ;  
kaj baldaŭ dancos sesan. ....

### **,& Sesa parto. Militfine:**

'220 Faris Valdemar' kaj Nina  
; savlaboron sukcesan. ; Jam  
ni dancis parton kvinan. ;  
Venas parto sesa. ....

'221 En aŭtuno rusa avanco ;  
Germanujon minacos. ; Horti  
finas aliancon ; kaj proklamas  
pacon. ....

'222 Sagokruco puĉon faras\* ;  
en la sama tago. ; Nun neniu  
rajto staras ; kontraŭ teruragoj.  
.....

'223 Oni malpermesis judojn ;  
eliri el la ghetto ; sed  
kadavrojn en Danubon ;  
ĉiutage ĵetas. ....

'224 Nina en Monahinejo ; de  
la Sankta Koro ; kun estrino  
Hildegardo ; nokte savlaboras.  
.....

'225 Malfermiĝas pordo subite  
; "Vivu Salaŝio\*!" ; krias deko  
da plenarmitoj ; kelkaj en  
ebrio. ....

'226 "Ha! Por tiaj paperoj  
malbenaj ; tuta jen fabriko. ;  
Ni judaĉojn ĉiujn prenas. ; Vi  
vin identigu!" ....

'227 Vipas kaj tablon pistole  
martelas ; ili kaj blasfemas ;  
monon kaj ornamaĵojn ŝtelas ;  
monahinoj tremas. ....

'228 Postan tagon ili revenas ; serĉante judojn, ; ĉiujn en la domo ĝenas ; sed maltrafas la trudoj. ....

'229 Sagokrucanoj sen uniformo ; murdas en amoko. ; Oni ne du noktojn dormu ; en la sama loko. ....

'230 Sagokruco Valdemaron ; al morto juĝas ; ĉar li vivpereon baras ; por multaj kiuj fuĝas. ....

'231 Sagokruco jam lin ĉasas ; kun mortiga celo. ; Valdemar' malsana kuŝas ; en malvarma kelo\*. ....

'232 Flanken la kurtenon tiras ; bruto plenarmita. ; Valdemar' rigardas kun ; indiferento spita. ....

'233 Bruto lin rigardis zorge ; ĝis el iu angulo ; iu diris "Estas nur ; malsana maljunulo." ....

'234 Estis lia ŝanco bona ; ke razado mankas. ; Lin brutulo ne rekonas ; pro la barbo blanka. ....

'235 El la kela ĉambro tiu ; bruto re eliras. ; "Ĉu Langleon trovis vi?" ; brutkamarado miras. ....

'236 "Ne, li ne estas tie" ; respondis la unua. ; "Ĉu vi certas? Mi ne kredas!" ; diris tuj la dua. ....

'237 Enrigardis ankaŭ la dua ; zorge Valdemaron ; sed ne povis identigi ; lin tiu barbaro. ....

'238 Enrigardis bruto dua; por certecon havi. ; "Mi ne povas lin rekoni ; vi do tamen pravis." ....

'239 Tiel sub milita vintra ; budapeŝta korto ; Valdemar' saviĝis de ; la sagokruca morto. ....

'240 Malkonate li aspektis ; pro vizaĝo barba. ; Tial ne kaptiĝis li ; de Morto murde varba. ....

'241 Budapeŝton ĉirkaŭprenis ; soveta sieĝo. ; Anoj sagokrucaj ĉagrenis ; urbe en la neĝo. ....

'242 Konkeris Budapeŝton ; soveta armeo\*. ; Pluvivantojn de juda ghetto ; savis de pereo. ....

'243 Rodja Malinovskij\* malferma ; urbo ĝin deklaris. ; Ĉion ajn soldatoj rajtas ; sen puno fari. ....

'244 Nina diris "Monahinojn ;  
la soldatoj perfortos. ;  
Ruĝakrucajn vestojn ŝirme ;  
mi al ili portos." .....

'245 Baldaŭ soldatoj rusaj  
venis ; tra la doma pordo ; kaj  
komencis virinojn ĝeni ; en  
minaca ordo. ....

'246 Al soldatoj Nina kriis ;  
ruse per forta voĉo ; "Ĉu vi  
helpantojn sindonajn  
perfortos? ; Meritas vi  
riproĉon!" .....

'247 Junaj soldatoj al ŝi  
respondas ; haltis preskaŭ  
plore ; "Estimata patrino, ni  
hontas ; nin pardonu elkore!"\*  
.....

'248 Junaj soldatoj honton  
sentas ; kun okule larmo ;  
"Estimata patrino, ni pentas ;  
nin pardonu en armo!" .....

'249 Raul' ne kredis ke  
danĝeris ; por li soveta flanko  
; sed ĉe rusoj malaperis ; kaj  
mortis en Lubjanko\*. ....

'250 En printempo paco sonis  
; ĉesis jam pafado. ; Nova  
registaro ordonis ; forlasi  
ambasadon. ....

'251 Paro Langle' Svedujen  
venas ; sen eĉ unu groŝo. ; Sin  
vivteni ili penos ; kun  
malplena poŝo. ....

'252 Libron li verkis, Agoj kaj  
tagoj ; en Budapeŝto\* , kaj  
mendis ; helpon per aŭtora  
pago ; kaj Hungarujen sendis.  
.....

'253 Ĥaoson en Budapeŝto\* ;  
libre Nina rakontis ; pri  
danĝeroj tre honeste ; kiel  
homoj volontis. ....

'254 Oficiala rekono mankis ;  
por Valdemar' kaj Nina ; sed  
honore oni dankis ; ĉi heroojn  
fine. ....

'255 Ricevis de Ruĝa Kruco  
medalon\* ; ordenon de Norda  
Stelo\* ; justuloj inter la  
popoloj\* ; deklaris Israelo. ....

'256 Se vi povas pli rakonti ;  
pri Langlea faro ; strofon  
verku por tondronta ; balado  
Valdemara. ....

'257 Jen baladon Valdemaran ;  
kantis mi kaj prave ; kaj la  
lingvon tuthomaran ; kaj  
multajn vivojn\* li savis. ....

'258 Nun mi finas la baladon ;  
veran Valdemaran. ; Lian  
nomon tenu ĉiam ; en memoro  
karan. .... )



## <& Klarigoj al Valdemara balado:

Verkis kaj komponis Martin Strid (2015).

(\*):

'1 En Feroaj Insuloj travivis ĝis moderna tempo malnova tradicio ĉendanci baladojn.

'3 Hugenotoj estis kalvinistoj, viktimoj de religiaj masakroj, kiuj ekde jaro 1685 amase forlasis Francujon. Cento el ili alvenis al Svedujo.

'5 Mathilda Söderén (1832–1904), eldonisto kaj verkisto.

'6 Svede "Södermanland" aŭ "Sörmland", provinco sveona sudokcidentaŭ Stokholmo.

'7 Emil Viktor Langlet (1824–1898), arĥitekto.

'9 Spetebyhall, bieno en sudermanlanda paroko Lerbo apud Katrineholm'. Nupto estis en 1864.

'10 Filip Langlet (1866–1950), laboris konstruiste ĉe Robert Nobel dum 1890–1893 kaj sekretario ĉe Alfred Nobel 1896–1897 kaj 1899–1937 instruis en Tehnika Altlernejo de Stokholmo.

'11 Abraham Langlet (1868–1936), doktoro pri ĥemio, instruis en Chalmers Tehnika Altlernejo en Gotenburgo 1896–1933. Grafologo.

'12 Alexander Langlet (1870–1953), artisto kaj multjara prezidanto de Gotenburga Artista Klubo.

'13 Valdemar Georg Langlet (1872 decembre 17-an –1960 oktobre 16-a), pionira svedespo kaj ĵurnalisto.

'14 Ludwik Lejzer Zamenhof (1859–1917) eldonis Unuan Libron en 1887.

'18 Antonina Ĉajkovska (1872–1948), pionira rusespo.

'22 Otto Zeidlitz (1860–1943), svedespa multlingvulo, pastrigis en 1888.

'23 V. studis en Upsala universitato dum jaroj 1891–1894.

'25 Upsala Klubo Esperantista fondiĝis en 1891.

'27 Planlingvon Volapük inventis kaj publikigis germana pastro Johann Martin Schleyer en jaro 1879. ; Klubo germane "Nürnberger Weltsprachenverein" en 1888 forlasis Volapukon por Esperanto.

'31 Laŭbezone anstataŭu la vorton "baldaŭ" vorto "poste", "tuj" aŭ "nun".

'33 Ilja Ostrovski (1855–1910+?), kuracisto, anoncis en monata gazeto La Esperantisto en 1895 bonvenigon en sia domo.

- '34 "La Esperantisto", plej unua espa gazeto, eldoniĝis en Nurenbergo, Germanujo, dum jaroj 1889-1895. ; Erik Etzel, kamarado de V. en Upsalo.
- '40 Sinjoro W. Waher scipovis paroli nur estone, ruse kaj espe. Kun li V. unuafoje parolis espe sen alia lingvo ebla.
- '42 Lev Tolstoj (1828-1910), grafo kaj verkisto ; Inter la moskvaj rusespoj kiuj akompanis la svedojn menciigis nomo Puĉkovski.
- '43 Ruse "Vojna i mir", kvar volumoj de Lev Tolstoj 1865–1869 ; "Carstvo Boĵije vntri vas" 1894, malpermesita de la rusa cenzuro.
- '44 Ĉi tiun rezonon de Tolstoj citas V. en "Till häst genom Ryssland" ("Sur ĉevalo tra Rusujo") 1898, sur paĝo 46.
- '48 Antonina rakontis krimeajn popolfabelojn, kiujn V. poste publikigis en sveda gazeto.
- '50 La vaporŝipo nomiĝis Miĥail. ; Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863–1913), instruisto, ĵurnalisto kaj pionira rusespo.
- '51 Nikolao Borovko sendis al Z. leteron en 1895(?) demandante kio kondukis Z.on al esp. La respondon Vladimir Gernet el la rusa tradukis en esperanton kaj publikigis en Lingvo Internacia.
- '52 Tiu voĉdono okazis en 1894.
- '58 Vladimir Gernet (1870–1929), pionira rusespo, ĥemiisto kaj vinberinstituteŝto.
- '60 En la dua numero de 1895.
- '66 Du vaporŝipojn ili malelektis pro la drinkemo de ties anglaj ŝipestroj. Ili iris per ŝipo Jekaterina II.
- '70 Ahmed paŝao, membro de Grand-sinjora Kortego de la sultano de Otomana Imperio.
- '75 "Lingvo Internacia" eldoniĝis en Upsalo 1895–1899, poste alilande. Unue faris ĝin V., d-ro Sven E. Krikortz (-1931), Paul Nylén (1870-1958) kaj Per Ahlberg (1864-1945).
- '83 La dua rusa vojaĝo de V. estis en jaro 1896.
- '84 Nina Borovko-Langlet (1896–1988) naskiĝis en aŭgusto baldaŭ post la dua vizito de V.
- '86 Aleks laboris por petrolea ekspozicio de Nobel.
- '87 Poste Aleks kaj V. kune vojaĝis al Polujo, Hungarujo kaj Italujo.
- '88 En Budapeŝto oni festis en jaro 1896 mil jarojn post la "landpreno" de Hungarujo.
- '90 Estis en jaro 1897.
- '92 Jasnaja Poljana ("Luma Kampo"), vilaĝo 180 kilometrojn sudob Moskvo.
- '95 Tiun gravan por li interparolon priskribas V. en sia libro "Till häst genom Ryssland", paĝojn 79–84.
- '98 Sergej Aleksandroviĉ, rekta prapranepo de Ŝahin Ĥan Geraj kaj tronheredunto de Tatarujo Krimea.
- '99 Dmitri Ivaniĉ, vilaĝa paca juĝisto en Filonovskaja en 1897. ; La atamano, tio estas kozaka estro, nomiĝis Pugaĉev ; Filonovskaja,

vilaĝo en Don-kozaka regiono, 680 kilometrojn sudorientob Moskvo.

'101 En Filinovskaja V. loĝis kun la familio de Pavl Stepaniĉ Fokin kaj liaj edzino Marja Varfolomejevna, filino Ŝurenka, fileto Ivan, patrino Olga Markovna, fratino Dunja, bofrato Avrelian kaj ilia dekkvinjara filino Vanda.

'108 Signe Paulina Blomberg (1876-1921), flegistino, filino de Karl Evert Blomberg kaj Paulina Grosskopf, edziniĝis al V. en sia hejmurbo Åbo (suome Turku), Finnlando, tiama Rusujo, en 1899. ; Akvelando (svede Åland, suome Ahvenanmaa), insulara provinco finnlanda kaj svedlingva en Balta Maro.

'110 Oscar Dua (1829–1907), reĝo de Svedujo 1872–1907 kaj de Norvegujo 1872–1905.

'112 Emil Langlet (1900–1966), Lars Langlet (1903–1981).

'114 Svede "Om revolutionsrörelsen i Ryssland" ("Pri la revolucia movado en Rusujo") 1906, pri jaro 1905.

'116 Sveda Esperanto-Federacio fondiĝis en 1906. V. estis ĝia prezidanto ĝis 1909.

'117 Svede "Om kriget på Balkan" ("Pri la milito en Balkano") 1912.

'118 Svede "Frihetskorsset av tredje klass", suome "Vapaudenristin ritarikunta", 1918. Finnlando sendependiĝis en 1917.

'121 V. iris al Moskvo en 1923.

'125 V. kaj Nina geedziĝis en 1925.

'130 Laŭ Traktaĵo de Trianono la 4-an de junio 1920 Hungarujo perdis 72 procentojn de sia teritorio kaj 62 procentojn de sia loĝantaro.

'131 V. rajdis 1000 km-ojn tra Hungarujo en 1931. Svede "Till häst genom Ungern" 1934.

'133 Ek de 1932 V. instruis la svedan en Pálmány Péter universitato en Budapeŝto.

'135 V. estis nepagata sveda kultura ataŝeo en Budapeŝto 1938–1944.

'136 Adolf Hitler (1889–1945), nazia partiestro 1921–1945 kaj diktatoro de Germanujo 1933–1945.

'138 Arja, el sanskrita vorto por "nobla", nazie signifas ana al la propra (germana) "raso", ĝenerale homo helkolora haŭte, hare kaj okule.

'140 Svastiko, aŭ hoka kruco, antikva sunsimbolo, uzita por nazia partio.

'141 Germanujo invadis Polujon en 1939 septembre 1-an.

'143 Germanujo okupis Aŭstrujon en 1938 marte 12-an.

'144 Batalo de Stalingrad (antaŭe nomata Caricin, poste Volgograd) daŭris de 1942 aŭguste ĝis 1943 februare.

'145 Germanoj puĉis Hungarujon 1944 marte 19-an.

'146 Per Anger (1913–2002), sveda diplomato.

'147 Adolf Eichmann (1906–1962), alta oficiro de nazia polico Schutzstaffel.

- '156 Carl Lutz (1895–1975), svisa diplomato.
- '162 Hungare "Nyilaskeresztes Párt – Hungarista Mozgalom", hungara nazieska partio dum 1935–1945.
- '173 Folke Bernadotte (1895–1948), sveda princido kaj grafo. Lin murdis israelanoj en Jerusalemo dum lia pacmisio por Unuiĝintaj Nacioj.
- '174 La ĝenerala sekretario de la eksterlanda ministerio nomiĝis Arnóthy-Jungert.
- '184 Friedrich Born (1903–1963), svisa diplomato, delegito de Internacia Komitato de Ruĝa Kruco de majo 1944 ĝis januaro 1945.
- '185 Constantin Karadja (1889–1950) rumana diplomato ; Ángel Sanz-Briz (1910-1980) hispana diplomato ; Angelo Rotta (1872–1965), apostola nuncio.
- '192 Giorgio Perlasca (1910–1992), itala negocisto.
- '193 Vrba-Wetzlerraporto, 1944 aprile, unu el la "Auschwitz-protokoloj", verkita de eskapintoj de Birkenau, nome Walter Rosenberg alias Rudolf Vrba (1924–2006) kaj Alfréd Wetzler (1918-1988).
- '196 Pinchas Freudiger (??–19??), ekleziestro kaj membro de Juda Konsilantaro en Budapeŝto.
- '199 Gustaf Kvina (1858–1950), reĝo de Svedujo 1907–1950.
- '200 Ivan Danielson (1880–1963), sveda diplomato.
- '205 Heinrich Himmler (1900–1945), estro de nazia polico Schutzstaffel dum 1929–1945.
- '201 Horthy Miklós (1868–1957), hungara ŝtatestro dum 1920–1944.
- '211 Prins Carl (1861–1951), reĝido de Svedujo, estro de Sveda Ruĝa Kruco 1906-1945.
- '214 Raoul Wallenberg (1912–1947), sveda diplomato.
- '222 Sagokruca puĉo okazis 1944 oktobre 16-an.
- '225 Ferenc Szálasi (-1946), estro de Sagokruca Partio 1932-1946, mortpunita.
- '231 Ĉi epizodon priskribas Björn Runberg en sia libro "Valdemar Langlet – räddare i faran" ("V. L. – savanto en la danĝero") 2000, paĝon 37.
- '242 Soveta armeo prenis Budapeŝton en 1945 januare 16-an.
- '243 Rodion Malinovskij (1898 – 1967), soveta marŝalo kaj ministro pri defendo 1957-1967.
- '247 Pri ĉi epizodo Nina foje parolis, diris Pieter Langlet kaj Monika Langlet-Forsberg, genepoj de V., en 2015 aprile.
- '249 Lubjanko, malliberejo en Moskvo kaj centro de soveta spiona agentejo NKVD, poste nomata KGB. Supozeble tie en 1947 Raul' mortis.
- '252 Svede "Verk och dagar i Budapest" 1946. La monon pro la libro V. uzis por sendi krizan helpon al Hungarujo.
- '253 Svede "Kaos i Budapest" 1982, espa traduko en 2001.

'255 Svede "Röda Korsets  
silvermedalj" 1946 ;  
"Nordstjerneorden" 1949? ; hebree  
"Hasid Ummot Ha-'Olam", "Jad  
Vašem" 1965.

'257 Oni taksas ke la Langlea agado  
en la militfino savis inter dekmil kaj  
dudek mil homojn, sed eble pli.

>



## & La bapto de caro Vladimir:

< Rekante 15 el 29 kaj en la naŭa kanto 16 el 32 batoj por strofo, entute 7569 paŝoj dum 1 horo kaj 21 minutoj. Satiron verkis Karel Havliček Borovský (1830). El ĉeĥa tradukis Tomáš Pumpr (1953). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodioj kaj rekantaĵoj de Leiva balado (Leivur Øssursson) kaj, por la naŭa kanto, Olav Rajdistrozo.>

### (#Melodioj:

(# Leiva balado: <1,5:29> /mimi mimi redo doLa; dore mimi mimi; mido dore redo doLa; dore mimi mimi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La a))×215

((# Olav Rajdistrozo: <2,3:4> /mi i mi mi /so ofa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi ilre do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o)×29

(# Leiva balado)×14

)+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua kanto. Perun kaj Vladimir:

'1 Kiam festis naskiĝtagon ;  
Caro Vladimiro, ; cargardist'  
al dio Perun ; kuris kun la  
diro:

(×: Paŝu firme sur plank', ;  
ŝuojn trivu ankaŭ, ; regu  
dio, ; kie dancos ni sen  
mank'.)

'2 "Tondru, di', ĉe mia festo! ;  
Mi kanonojn ŝparas, ; la  
armeo ja militas ; kaj la pulvo  
karas. ....

'3 Tondru, Perun, anstataŭu ;  
mian kanonadon! ; Post la faro  
vi kun Caro ; trinkos  
ĉokoladon". ....

'4 La gardisto frapas pordon ;  
de l' di-familio ; kaj demandas  
servistinon: ; "Hejmas mastro  
dio?" ....

'5 "Jes, jes, moŝta policisto, ;  
iru en la domon" ; Mastro  
sidas ĉe la forno, ; flikas  
pantalonon". .....

'6 "Caro vin salutas, mastro, ;  
kaj mi devas peti, ; ke vi volu  
ĉe l' carfesto ; iom tambureti".  
.....

'7 Paĉjo Perun sulkis brovojn,  
; en kudrado haltis, ; ĵetis for  
la pantalonon, ; de sur formo  
saltis: .....

'8 "Kiu paŝtas la anserojn, ;  
ĝuas pli da bono ; ol mi, dio  
de Rusio, ; sklavo de la trono!  
.....

'9 En deĵoro nur laboro, ;  
preskaŭ sen salajro – ; Eĉ dum  
fest' mi Caron distru ; per la  
fulmofajro? .....

'10 Jen, dum mi lastfoje  
tondris ; kaj komencis fulmi, ;  
mi hazarde truis arde ;  
pantalonon sur mi! .....

'11 Servomono sen aldono ;  
kaj sen kromenspezo – ; Mi  
salaton ne oleas ; pro tro alta  
prezo! .....

'12 Akvon trinki, nur dimanĉe  
; estas viandpeco – ; La  
prebendo\* ja sufiĉas ; eĉ ne  
por edzeco! .....

'13 Mi per privat-instruado ;  
vivi klopodegas ; kaj fizikajn  
lecionojn ; al studentoj legas.  
.....

'14 Se ne sendus kampistinoj ;  
ion en la domon, ; eĉ dimanĉe  
mi ne povus ; flari brand-  
aromon. .....

'15 Mi nur mutas kaj servutas,  
; sed la buŝo sekas. ; Sur la  
caran ĉokoladon ; – diru – ke  
mi... fekas! .....

'16 Car' – necaro, fest' –  
nefesto ; donas saman perdon!  
; Ne kaj ne! Mi ne plu tondros,  
; ĉar mi gajnas... merdon!" .....

'17 Buŝmalferme kaj  
konsterne ; la gardist' ne  
spiras: ; "Rekonsciu, paĉjo  
mastro, ; kion ja vi diras! .....

'18 Mi mem – ankaŭ nur  
servisto – ; mian devon sentos.  
; Nu, vi sidas en la kaĉo, ; sed  
mi ne silentos!" .....

'19 Sed jam Perun ion serĉis ;  
sub la benka trabo – ; kaj  
kurpelis la gardiston ; per la  
tondroklabo. .....

'20 La sendito sen hezito ;  
serĉis aperturon ; kaj al  
Korto\* kun raporto ;  
entreprenis kuron: .....

'21 "Mi alvenas, Cara Moŝto, ;  
al vi raportonte – ; sed la  
vortojn de Peruno ; mi ripetos  
honte. ....

'22 Li ne tondros, eĉ min pelis  
; kiel hundan beston ; kaj per  
pliaj vortoj fiaj ; lezis la  
majeston: ....

'23 Ke la Car' la ĉokoladon ;  
sola devas leki – ; li aŭdacas  
sur la servon ; ... pardonpete ...  
feki. ....

'24 Por li samas cara festo ;  
kaj ... eh ... furzo-perdo, ; por  
li estas tuta Caro ; ...  
pardonpete... merdo!" ....

'25 Ekaŭdinte Vladimiro ; pri  
la fia vorto, ; aĉe kraĉis, akre  
sakris, ; kaj kun li la Korto.  
.....

'26 Li ekspedis al Peruno ;  
policistan kvaron: ; "Aleskortu  
la kanajlon ; antaŭ lian  
Caron!" ....

'27 Sed tuj fajfe li revokas, ;  
tra fenestro gestas: ; "Restu!  
Nin ne duŝos pluvo, ; se ni  
hejme restas. ....

'28 Ni ne fuŝos nian feston ;  
pro la bagatelo. ; Sed ni  
morgaŭ la friponon ; tiros ĉe  
orelo! ....

'29 Por ni nepre ne necesas ;  
liaj tondro-konoj, ; ĉar ni  
ankaŭ povas tondri – ; per  
milit-kanonoj! ....

'30 Iru nun la adjutanto: ; Ni  
ordonas salvi ; per du kanon-  
baterioj, ; dum ni tostos al vi!"  
.....

'31 Vinoj fluis, gastoj bruis, ;  
ludis la muzikoj, ; la ministroj  
sin malzonis ; sur la  
umbilikoj. ....

'32 Kukojn, brandojn kaj  
viandojn ; ili alstomakis, ; ĝis  
sur pluraj oficiroj ; veŝtoj  
streĉe krakis. ....

'33 Ili voĉis, danc-diboĉis ;  
inter halkolonoj. ; Paf! paf!  
krakis botel-korkoj, ; krakis la  
kanonoj. ....

'34 Ĉiuj tie ĝisebrie ; drinkis,  
kaj post festo ; estis sataj  
disportataj, ; ĉiu kun manĝ-  
resto\*. ....



## **,& Dua kanto.**

### **Mastrumado:**

'35 Unu mont' al nuboj  
kreskis, ; unu kreskis fuŝe – ;  
iu havas muzikbandon, ; iu  
fajfas buŝe. ....

'36 Ili kriis kaj ebriis ; ĉe la  
Car-festeno, ; sed Peruno tutan  
tagon ; grumblis de ĉagreno:  
.....

'37 "Vi sensperte vivas certe,;  
neestinte dio. ; False ŝajnas, ke  
mi gajnas ; en la profesio! .....

'38 Mi matene devas pene ;  
rosi kampan valon, ; hejti  
sunon, kaj la lunon ; fermi en  
la stalon. ....

'39 Noktfantomojn kaj  
demonojn ; en la sakon loki, ;  
la stelflokojn kiel kokojn ; el  
nestejo voki. ....

'40 Ĉies buŝo: birdo, muŝo, ;  
pulo, elefanto, ; frue jam ĝi  
volas manĝi ; el di-provianto.  
.....

'41 La ekstaro de l' homaro, ;  
aĥ, ĝi kaŭzas servojn! ; La  
lamento de l' homgento ; ŝiras  
miajn nervojn! .....

'42 Nur se pikoj de formikoj ;  
vian aŭdon ĝenus, ; la  
matenan aŭdiencon ; eble vi  
komprenus. ....

'43 Preĝoj svarmas kaj  
alarmas, ; ĝis mi preskaŭ  
surdas: ; tiu kantas, flustras,  
larmas, ; tiu psalmojn gurdas.  
.....

'44 Ĉu kalkuli la postulojn? ;  
Estus vane peni! ; Kapo  
krevus, se mi devus ; ĝin nur  
memorteni: .....

'45 Doni sanon kaj infanon, ;  
panon por satmanĝi: ; ke  
fabrikoj ĉesu ŝpini\*, ; devus  
di' aranĝi! .....

'46 "Gardu grenon kaj  
ĝardenon!" ; oni al mi taskas;  
nova krio: "Helpu dio! ; La  
bovino naskas!" .....

'47 La vetero estu varma ; kaj  
samtempe frosta, ; la sekalo  
estu kara ; kaj malmultekosta.  
.....

'48 Pluvu! Iu semis linon, ; di'  
ĝin rosu bene! ; Pluvi! Oj ne!  
Sed porfojne ; brilu sun'  
serene! .....

'49 Ve, ke estis virinaĉoj ;  
estigitaĵoj per mi! ; La ĉagrenan  
bandon ĝenan ; devos mi  
ekstermi! .....

'50 Tondro ilin...! Jam eĉ dio ;  
devs ja blasfemi! ; Se ne  
laktas la kaprino, ; ili plendas  
ĉe mi. ....

'51 Ĉiu vivus ne per zorgoj, ;  
sed per preĝovorto, ; Kvazaŭ  
oni havus dion ; sole por  
komforto. ....

'52 Akvon, sekon, kampan  
sterkon ; dio disdonacu! ; Se  
porkulo sanon perdis, ; mi lin  
rekuracu! ....

'53 Ŝi min tedas, ĉe mi pledas,  
; ke ŝin oni svatu; edzo preĝas,  
ke jam tondro ; la edzinon  
batu! ....

'54 Kiu volas loton gajni, ;  
subaĉetas dion; kiu pagis  
asekuron, ; volas incendion!  
.....

'55 Ho, se mi ne tro indulgus ;  
vin, la hombandaĉon, ; mi vin  
premuse kiel prunojn, ; farus el  
vi kaĉon!" ....

'56 Li enspiris naztabakon, ;  
ternis bombobrue... ; Tondro  
frapis, fulmo fajris, ; pluvo  
ŝprucis flue. ....

'57 Kredu, frato! ; Ne amuzas  
; tiu di-ekzerco! ; Briksen\*  
mem – kompare tion – ; estas  
preskaŭ ŝerco. ....

'58 Fine ĉesis mondo zumi, ;  
venis nokto paca; nun deziris  
pipon fumi ; Perun zorgo-laca.  
.....

'59 Ŝtopis li en turkan pipon\* ;  
la tabakporcion... ; Jen  
komencis Perunino ; longan  
litanion: ....

'60 "Bone mi tra pordotruo ;  
subaŭskultis tion, ; ke ci antaŭ  
policisto ; lezis dinastion. ....

'61 La skandalo kun la caro! ;  
Sed mi diras veron: ; ci  
mallerte fuŝos certe ; cian  
karieron. ....

'62 Per malpaco sen sagaco, ;  
sen ĝentila trakto ; ci fabrikos  
malamikojn, ; mankas al ci  
takto!" ....

'63 Se sen fino la edzino ;  
bojas kaj atakas, ; ne nur nia,  
sed eĉ dia ; pacienco krakas.  
.....

'64 Oj, Peruno, se jam nuno ;  
kaŭzas, ke mi plendas, ; pli  
dolora marŝo plora ; morgaŭ  
vin atendas. ....

'65 Oj, Peruno, vi per puno ;  
pentos vian faron, ; ĉar  
sentime malestime ; vi ofendis  
Caron. ....

'66 Di' kuraĝa, sed malsaĝa, ;  
savu vin per kaŝo! ; Se vi  
spitos aŭ hezitos, ; pendos vi  
en maŝo. ....

## **,& Tria kanto. Milita tribunalo:**

'67 Dio! Esti policisto ! ; Kia ŝerco estas! ; Kiujn ajn li volas kapti, ; kaptas kaj arestas. ....

'68 Ĉiu devas lin respekti; kiu ekgrimacas, ; pro ofendo de l' polico ; kaĝo lin minacas. ....

'69 Knaboj, ŝatu la policon! ; Ho ve, mi ĝin ŝatas! ; Ŝtato vergas la tajlorojn, ; sed ŝuistojn batas. ....

'70 Lernu el la elegio, ; el la kanto plenda: ; ĉe l' polico eĉ mem dio ; estas sendefenda.

.....

'71 Perun jam en ĉenoj iras ; – gape ni disbuŝas! ; Du lin ĉe la ŝultroj tiras, ; unu dorse puŝas.

.....

'72 "Ho, mi laŭ la domo-dorsoj ; irus tre volonte. ; La skandalo en la urbo ; tuŝus min tro honte." ....

'73 Tamen tie Perunino ; staris ĉe ŝanelo\* ; kaj ellavis ion flavan ; sur infankitelo. ....

'74 Ŝi ekkriis, ekkoninte ; l' edzon sub konduko, ; kaj plaŭdbatis la eskorton ; per malseka tuko. ....

'75 Tamen Perun ŝin admonas ; kun humila koro: ; "Metu glavon en la ingon, ; venis mia horo!" ....

'76 Dum instruas la polico ; Peruninon muti, ; la juristoj jam komencas ; pri la kaz' diskuti. ....

'77 Noktas Perun en la truo, ; ĉenoj lin katenas. ; Tamen ve! La paragrafoj ; iel ne konvenas. ....

'78 La aŭtoro de la leĝoj ; ja ne havis scion, ; ke la Car' procesos iam ; ankaŭ kontraŭ dion. ....

'79 Kaj matene la juristoj ; – palaj kiel neĝo – ; ŝokis Caron: "Kontraŭ Perun ; ne ekzistas leĝo". ....

'80 "Vi azenoj!" Car' kriante ; la juristojn mokis, ; kaj Militan Tribunalon ; el kazernoj vokis. ....

'81 La soldatoj – akraj knaboj – ; en juĝ-arto fortas: ; ĉiujn siajn paragrafojn ; en kuglujo portas. ....

'82 La Civilan Tribunalon ; ili mokas trafe: ; ili juĝas laŭokule, ; ne laŭparagrafe.

.....

'83 La Milita Tribunalo ; –  
kiel la ezoko – ; glutas kulpajn  
kaj senkulpajn ; laŭ komanda  
voko. ....

'84 La Milita Tribunalo ; ne  
bezonis dikton: ; el nenio –  
kiel dio – ; kreis la verdikton:  
.....

'85 "Laŭ la Komandant-Edikto  
; pri Juĝ-Proceduro ; kaj  
ceteraj leĝoj de la ; Kriminala  
Juro ....

'86 Perun krimis per ofendo ;  
de l' majesta caro, ; per ribelo,  
fiparoloj, ; malobeo faro. ....

'87 Li meritas pendumilon ;  
juste kaj laŭjure, ; tamen oni  
amnestie ; lin dronigos nure.  
.....

'88 Sed ke sciu la spituloj ; pri  
la spito-kosto, ; oni trenos lin  
en Dnepron ; sur ĉevala  
vosto". ....

'89 Ankaŭ unu ĵurnalisto ;  
sidis post la krado ; pro  
broŝuro ateisma ; kaj prio  
blasfemado. ....

'90 Tiam ĉi la Tribunalo ;  
montris senpartion: ; ateiston  
trafis puno, ; kia trafis dion.  
.....

## **,& Kvara kanto.**

### **Testamento de Perun:**

'91 Aŭdu, aŭdu, ho kristanoj, ;  
pri novaĵo grava: ; mortis  
pente kaj turmente ; Perun, dio  
slava. ....

'92 Neharditoj ŝtopu aŭdon ;  
per la fingropintoj ; kaj per pia  
'Patro nia' ; preĝu por  
mortintoj. ....

'93 Oni al la vost' ĉevala ; lin,  
la dion, ĉenis ; ambaŭkrure kaj  
nun kure ; sur la ŝtonoj trenis.  
.....

'94 Kaj tujposte ĉevalvoste ;  
tiu ĵurnalisto ; senkompate  
fortrenate ; sekvis sen rezisto.  
.....

'95 Jen la Caraj torturistoj ;  
tien ilin tiris ; kaj tra kurbaj  
stratoj urbaj ; en kotaĵoj  
ŝmiris. ....

'96 Kaj al Dnepro altreninte ;  
ambaŭ torturatojn, ; oni ilin  
ĵetis akven ; kiel blindajn  
katojn. ....

'97 Ili – kiel luteranoj – ;  
mortis sen absolvo, ; nur  
havinte Lastan Ŝmiron\* ; per  
la kot' kaj polvo. ....

'98 Mi – mem tion ne vidinte  
– ; legis komunikon, ; kiun  
Nestor\* por la nepoj ; skribis  
en kronikon. ....

'99 "Tiel en la mondo ĉio ;  
pasas en sekundo: ; kiu nune  
estas dio, ; morgaŭ estos  
hundo. ....

'100 Jen hodiaŭ al vi, dioj, ; la  
incenso brulas, ; kaj post horo  
la popolo ; vin en koto rulas.

.....

'101 Por komfort' la homoj al  
si ; novajn diojn faras: ;  
hieraŭa pendumito ; sur altar'  
nun staras. ....

'102 Ĉio estas vana vanto, ; eĉ  
la regno dia, ; en la finon kaj  
ruinon ; falas mond' la fia. ....

'103 nur la caroj kaj despotoj ;  
kaj simila ŝlimo ; – kiel fortaj  
juftaj botoj – ; daŭros sen  
temp-limo". ....

'104 Tiel Perun antaŭ morto ;  
rezonadis pie. ; Mi nur vendas  
aĉetaĵojn, ; do sengarantie. ....

'105 Mi ja tion ne elpensis ;  
por ĉi tiu verko, ; ĉar mi, eĉ se  
estus vero, ; pentus en  
Ŝpilbergo\*. ....

'106 En Ŝpilbergo, en  
Kufŝtajno\* ; multas loĝo-  
haloj. ; "Dio gardu nian  
reĝon!"\* ; kantas najtingaloj\*.

.....

'107 Laŭdu, filo, ĉion kio ; sur  
la trono sidas: ; la humilajn  
animetojn ; Car' favore vidas.

.....

'108 Ŝtatlojala idioto ; havos  
karieron. ; Kiu spitas, akvon  
trinkos, ; spertos nur mizeron.  
.....

## **,& Kvina kanto. Sendieco en Ruslando:**

'109 Nun la akcidento kaŭzis ; grandan historion: ; l' Eklezio vidviniĝis, ; rusoj perdis dion. ....

'110 Ni facile trovus helpon, ; vidu, jen kontrasto: ; ĉe ni ĉiu pastro faras ; diojn el bakpastro\*. ....

'111 Sed la rusoj la ĵonglaĵojn ; ne ankoraŭ konis. ; Ili estis do sen dio, ; kiam Perun dronis. ....

'112 Jen komencis ĉiuj timi, ; ke nun venos puno: ; kiu aŭdis pri tiaĵo ; en Rusland' ĝis nun? ....

'113 Tamen malgraŭ homaj penoj ; mondo ne ŝanĝiĝas: ; post mil kraĉoj en la maron ; ondoj ne ŝaŭmiĝas. ....

'114 Kaj la rusa ŝtatmaŝino ; en malnova relo ; kuris ankaŭ sen Peruno ; kiel karuselo. ....

'115 Etaj beboj naskiĝadis, ; mortis homoj avaj; la drinkemaj plu ebriis, ; penis plu la bravaj. ....

'116 Kreskis prunoj en aŭtuno, ; piroj en somero; ĉiam post longdaŭra pluvo ; helis la vetero. ....

'117 Suno brilis nur dumtage, ; nokto luno lumis; en somero eĉ la Caro ; ŝvitis kaj varmumis. ....

'118 Grenon devis oni semi, ; mem kreskadis lolo; la nobeloj movis buŝojn, ; brakojn la popolo. ....

'119 Kiu pagis al sinjoroj, ; estis favorato; ĉe soifo oni trinkis, ; manĝis ĉe malsato. ....

'120 Akvaj estis la riveroj, ; rokoj estis ŝtonaj; pri monhavaj kampistinoj ; klaĉis la senmonaj. ....

'121 Kun la burĝoj la nobelo ; nepre ne kontaktis; gastejestroj la bieron ; en barelo baptis\*. ....

'122 La maljunaj homoj lamis, ; fraŭloj pli rapidis; ĉiu devis iom plori, ; kiu iom ridis. ....

'123 Parazitoj ekspluatis, ; malriĉuloj larmis; saĝaj homoj estis raraj, ; idiotoj svarmis. ....

'124 Kiu trompis sub Peruno, ; daŭris plu friponi; kiu havis bonan koron, ; tiun tordis oni. ....

'125 Ĉar eĉ malgraŭ homaj penoj ; mondo ne ŝanĝiĝas: ; post mil kraĉoj en la maron ; ondoj ne ŝaŭmiĝas. ....

'126 Do la rusa ŝtatmaŝino ; en malnova relo ; kuris ankaŭ sen Peruno ; kiel karuselo. ....

'127 La maŝinon eklezian ; tamen trafis krako, ; ĉar al pastroj elsekiĝis ; fontoj de l' monsako. ....

'128 La kampistoj – la friponoj ; kiuj ĉiam ruzis – ; la dronigan historion ; avantaĝe uzis: ....

'129 ĉesis pagi dekonaĵojn\* , ; preĝojn ne abonis, ; nek benadojn , nek la mesojn, ; ĉar ja dio dronis. ....

'130 Pasis psalmoj super tomboj, ; oferadoj pasis, ; preĝejistoj\* mortmalsatis, ; pastroj ekmalgrasis. ....

'131 Jen okazis tuj mirakloj: ; bildoj sangon duŝis, ; unu ĉasta virgulino ; drakojn kvar akuŝis. ....

'132 Virinaĉoj vidis signojn\* ; en ĉiela ruĝo ; kaj vendadis la vestaĉojn: ; "Venas tag' de l' juĝo!" ....

'133 Signojn ili vidis ĉie: ; supre kaj sub grundo, ; kaj en ĉiuj fendoj aŭdis ; muĝon de inundo. ....

'134 Fianĉino naskis idon ; jam post kvaronjaro: ; "Ve! Aĉetu naĝ-vezikojn, ; dronos la homaro!" ....

## **,& Sesa kanto. Aŭdienco:**

'135 Sub insignoj de l' Cardignoj ; Vladimiro tronis ; kaj kun graco en palaco ; aŭdiencon donis. ....

'136 La ministroj, konsilistoj, ; Kortaj kavaliroj ; bonkondukte, streĉe, mute ; staris en spaliroj. ....

'137 Kaj la Kortaj ĉefskribistoj ; antaŭ ili plue ; respektplene, sklavmiene ; kaŭris surgenue. ....

'138 (Inkbotelo sur butono, ; plumo kaj petskriboj ; en la sakoj sub la brakoj ; kaj sur dorsoĝiboj.) ....

'139 La ĝendarmoj kun punarmoj ; en la antaŭhalo ; kverkan benkon metis preta ; por eventualo. ....

'140 Kaj kun danko sur la planko ; en la ĉambrocentro ; civitanoj levis manojn ; kuŝe sur la ventro. ....

'141 Tiu-foje la palaco ; de tumulto tremis: ; l' Eklezio de Rusio ; antaŭ Car' sin premis: ....

'142 la tombistoj, sonoristoj, ; diakonoj, popoj, ; vendistinoj de kandeloj, ; ĥoroj, episkopoj; ....

'143 kapelestroj kun orkestroj,  
; preĝej-intendantoj, ; eĉ la  
buboj mes-alservaj ; kaj  
orgen-tretantoj\*. ....

'144 La heroldo ektamburis, ;  
tuis kaj avertis: ; "La Orelojn  
la plej Altajn ; Moŝta ĉar'  
apertis". ....

'145 Kaj tuj ĉiuj di-servistoj ;  
kun ploreg-eksplodo ; ĝemis,  
plendis kaj lamentis ; laŭ  
cigan-metodo\*; ....

'146 la tombistoj, sonoristoj, ;  
diakonoj, popoj, ; vendistinoj  
de kandeloj, ; ĥoroj,  
episkopoj; ....

'147 kapelestroj kun orkestroj,  
; preĝej-intendantoj, ; eĉ la  
buboj mes-alservaj ; kaj  
orgentretantoj. ....

'148 Caro diris kun favoro: ;  
"Nu, vi kial veas?" ; Jen  
eksonis unu ĥoro: ; "Helpu, ni  
pereas!" ....

'149 Ili sendis antaŭ tronon ;  
deputitan aron ; kaj el ili unu  
popo ; alparolis Caron: ....

'150 "Grandas caro Vladimiro,  
; sanktas volo lia! ; Sed  
murdinte nian dion, ; zorgu pri  
alia! ....

'151 Dio tia aŭ alia, ; nur se  
estus iu, ; ke kampistoj – lin  
timante – ; nin reputaciu. ....

'152 Cara volo? La popolo ;  
baldaŭ fuĝos de ĝi, ; ne  
havante ja al kiu ; por la Caro  
preĝi. ....

'153 La kampistojn devas iu ;  
per la tondroj teni. ; Ni sen dio  
estas nuloj, ; igu iun veni!" ....

'154 Komprenoble ke ĉi tiu ;  
trafa argumento ; la Majestan  
Caran Saĝon ; tiris al atento.  
....

'155 Kiel ĉiuj suverenoj ; li ja  
tre afablis, ; kolon eĉ al  
kokideto ; rompi ne kapablis.  
....

'156 "Iru, karaj civitanoj, ; iru  
nur kontente! ; Ni la peton  
konsideros ; saĝe kaj  
prudente". ....



## **,& Sepa kanto. Kunsido de Kabineto:**

'157 Nokte tuta registaro ; sidis en ofico, ; kaj ĉi-foje dio venis ; je unua vico. ....

'158 Pri ĉefpunkto ĉiuj havis ; saman opinion: ; ke popolo ne obeas, ; nehavante dion. ....

'159 Sed ne eblis pri detaloj ; interkonsentiĝi ; kaj disiris en du partojn ; opinioj pri ĝi. ....

'160 Nova skolo por aŭkcio ; plede streĉas vervon, ; la malnova ree laŭdas ; naturpagan servon\*. ....

'161 La Ministro de Interno ; diris: "Karaj fratoj! ; Dispubliku ni konkurson ; por la kandidatoj. ....

'162 Ili devas sin anonci ; orde kaj en deco, ; kaj el ili Car' elektos ; laŭ kvalifikeco". ....

'163 La Ministro de Ekstero ; rekomendis grande: ; "Oni tion dispubliku ; ankaŭ eksterlande. ....

'164 Hejme serĉi, kompreneble, ; estus peno vana. ; Por ĉi servo ja ne taŭgas ; homo enlandana. ....

'165 Kaj ne dungu nespertulon, ; sed nur bonmeritan, ; aĝe lertan, saĝe spertan ; viron elprovitan. ....

'166 Ankaŭ ne domaĝu rublojn ; por reputacio, ; se la fremdaj registaroj ; scios jam pri tio". ....

'167 La Financministro pledis ; laŭ kutimo faka: ; "Okazigu ni aŭkcion ; pri l' posteno vaka. ....

'168 Kiu volos kontentiĝi ; per plej eta sumo, ; al ĉi tiu la prebendon ; donu sen cerbumo! ....

'169 Sed ni provu laŭbezone ; el preĝejo havi ; ĉian oron kaj arĝenton ; por la rublon savi. ....

'170 Kurzon de la ŝtatpaperoj\* ; tenu li 'al pari\*', ; kaj la dio plu nenion ; ja bezonas fari". ....

'171 La Ministro de Konstruoj ; trovis la ĉefkernon: ; "Oni kelkajn monaĥejojn ; ŝanĝu en kazernon! ....

'172 Ĉar dum vakas la posteno, ; ŝpari povus caro ; intertempe la salajron ; de la monaĥaro". ....

'173 La Justicministro volis ;  
urĝe rekomendi, ; la sekvantan  
artikolon ; en gazetojn sendi:  
.....

'174 "Subskribante la  
kontrakton ; nova dio en ĝi ;  
prenas devon: falsajn ĵurojn ;  
per la tondro venĝi. ....

'175 Ĉar nun ĉiu pedikulo ;  
Caron jam imitas: ; ĵuras false,  
kaj eĉ farse ; tribunalojn  
citas". ....

'176 La Kulturministro –  
strange – ; rekomendis jenon: ;  
"Oni plu al Perunino ; lasu la  
postenon. ....

'177 Se l' vidvino iun dungos ;  
kiel prokuriston ; – jezuiton\*  
aŭ derviŝon\* –, ; tenos ŝi  
ekziston. ....

'178 Oni povus ĝin aranĝi ; ne  
tro multekoste, ; eĉ mi mem  
konsilojn donus, ; se necesus  
poste". ....

'179 Sed li – ruza klerikalo – ;  
kaŝis en la sino, ; ke li volus  
mem konduki ; firmon de l'  
vidvino. ....

'180 Sekvis la Militministro ;  
kaj parolis do li: ; "Ĉiu ajn  
eksgeneralo ; povus dion roli.  
.....

'181 Li respektas superrangon,  
; li respektos Caron; kaj por  
ŝtato ĝi signifus ; eĉ pensio-  
ŝparon. ....

'182 Jen marŝalo Buŝaperto\* ;  
lertas pri ĉikanoj: ; li per  
tondroj bridus vervon ; de la  
kampanoj. ....

'183 Nu, kaj por plifaciligo ;  
eble povus oni ; unu fraŭlon  
skribkapablan ; al li helpe  
doni. ....

'184 Tiel venos religio ; sub  
militkomandon ; kaj ni strikte  
organizos ; tiun popan  
bandon". ....

'185 La Ministro de Polico ; eĉ  
ne paroletis ; kaj en pako sub  
sigeloj ; la baloton metis. ....

'186 La polico kiel katoj ; en  
mallumo vadas ; kaj publikan  
tagan lumon ; ĉiam evitadas.  
.....

'187 Mi ne legis la enhavon, ;  
sed mi diras vete, ; ke lin  
jenon rekomendis ; al la Car'  
sekrete: ....

'188 jezuitojn, pekkonfesojn ;  
kaj purgatorion, ; panon,  
vinon kaj latinon\*, ;  
paciencon, pion: ....

'189 logon per ĉielpatronoj, ;  
paradiz-agrablojn, ; "ĉia povo  
supre fontas"\* , ; kornajn  
fidiablojn. ....

**,& Oka kanto. Kamarilo:**

'190 Caro, kiel ĉiu reĝo, ;  
kamarilon havis, ; kies vorto  
pli ol forto ; de l' ministroj  
gravis. ....

'191 Hej, Ŝumavsky\*! Notu al  
vi ; en la vort-indekso, ; ke 'la  
kamarilo' estas ; de virina  
sekso. ....

'192 Krome havis Vladimiro ;  
fortajn seks-inklinojn: ; virojn  
regis li leone, ; apre la  
virinojn. ....

'193 Li edz-havis bulgarinon, ;  
inon de normando, ; du  
ĉehinojn – belulinojn, ; unu el  
Greklando. ....

'194 Meretricojn\* po cent-  
vicoj: ; tri cent en Belgorod ;  
plus du cent en Berestovo, ; tri  
cent en Viŝgorod. ....

'195 Ankaŭ en kazern-filioj ;  
konkubin-amasojn: ; la kacik'\*  
en Hessen havas ; malpli  
multajn tasojn. ....

'196 Nun onklojn kaj  
patrinojn ; oni citu nome ; kaj  
iliajn konfespastrojn ;  
alkalkulu krome. ....

'197 Estis brila kamarila ;  
parlament' kun verovo, ; preta  
kiel ĉe hundisto ; hundviand-  
rezervo\*. ....

'198 Ĉiu sciis kandidaton ; kaj  
por li ŝi petis. ; Car' jam  
pentis, ke li dion ; en riveron  
ĵetis. ....

'199 Ĉiu pledis, Caron knedis,  
; ĉiu buŝ-muelis. ; Al la Caro  
blankaj haroj ; sur la kap'  
aperis. ....

'200 Nokte la maljuna Mates, ;  
lin senbotigante, ; grandajn  
plendojn kaj lamentojn ; aŭdis  
liaflanke. ....

'201 Sia ĉefa konsilanto ; Caro  
lin elektis: ; kamarilon kaj  
ministrojn ; Mates  
ŝnurdirektis. ....

'202 "Maĉjo, Maĉjo, finu tiun  
; mian turmentegon! ; Mi  
apenaŭ povas regi ; la virinan  
gregon." ....

'203 Mates caron enlitigis ; kaj  
– kun la botparo – ; kuris en la  
redakcion ; de la Ŝtatĵurnalo.  
.....

'204 Kaj li tie ion diktis ; –  
botojn sub la brako –: ; "Se ĝi  
morgaŭ ne aperos, ; sekvos  
granda krako!" ....

'205 Kaj matene tuta Kiev\* ;  
miris kaj miregis; en Bulteno  
oni jenon ; grandlitere legis:  
.....

'206 "La Majesta Rusa Caro ;  
Vladimir dekretas, ; ke Li  
vakan di-prebendon ; en  
konkurson metas. ....

'207 Oni petu la kondiĉojn ;  
kaj detalajn normojn. ; La  
Ministro de Polico ; donas la  
informojn." ....

'208 La novaĵo – kvazaŭ eroj ;  
de hidrargo-guto – ; tuj  
diskuris telegrafe ; tra la  
mondo-tuto. ....

'209 Morgaŭ – kvazaŭ se  
abeloj ; sur tilio svarmas – ; la  
depeŝoj redakciojn ; vekas kaj  
alarmas. ....

'210 Romaj Moŝtoj Kardinalaj  
; antaŭ mes-deĵoro ; trinkas ĉe  
la Ruĝa Kankro ; glason da  
likvoro. ....

'211 Kardinalo Ŝamŝulini ; la  
anoncon legis ; en "Aŭgsburga  
Ĝenerala"\* ; kaj sin ne plu  
regis. ....

'212 Englutinte unu kruĉon ;  
da 'Lacrimae Christi'\* ; kuris  
li al Vatikano\* ; urĝi kaj  
insisti. ....

'213 Li sin en la halon ĵetis ;  
eĉ sen pordofrapo ; kaj pri l'  
famo li trumpetis, ; ĝis vekiĝis  
Papo. ....

'214 Sankta Petro en ĉemizo ;  
saltis el la lito: ; "Ek al Kiev!  
Paku kofrojn ; ĉiu jezuito!"  
.....

'215 Por vojaĝo li al ili ; igis  
hufojn forĝi ; kaj komponi  
specialan ; novan marŝon por  
ĝi. ....

**, & Naŭa kanto. Marŝo de  
Jezuitoj:**

'216 'Te Deum /laudamus'\* –  
(×:; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)  
/Kiev nin /aklamu!

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!**  
; /**Iru plankon, dancu kun**  
/**granda em'!**))

'217 'Dies irae, dies illa'\* – .....  
Venos tien kredo nia .....

'218 'Te rogamus, audi nos'\* –  
..... Car' ja estas virtuoza'! .....

'219 'Gloria in excelsis Deo'\*  
– ..... Teni lin, jen ĉef-ideo!  
.....

'220 'Credo in unum Deum'\* –  
..... Nia dio pli obeos, ol obeis  
Perun. ....

'221 'Orate fratres'\* – ..... Ni  
kutimas al dres'. ....

'222 'Benedictus, qui venit'\* –  
..... Savo estas ne en sci, sed  
en fid'. ....

'223 'Sanctus, sanctus,  
sanctus'\* – ..... Batu tiujn,  
kiuj arogantus. ....

'224 'In nomine Domini'\* –  
..... Brulu la pres-opini'! .....

'225 'Dignum et justum est'\* –  
..... Al pasinto la honest'! .....

'226 'Dominus vobiscum'\* –  
..... Pli da stulto ol saĝum'! .....

'227 'Sancta Dei Genitrix'\* –  
..... Hejme sur nin venis kriz'.  
.....

'228 'Agnus Dei, qui tollis  
peccata'\* – ..... Rusoj kredos  
iel greg' paŝtata. ....

'229 'Veni, Sancte Spiritus'\* –  
..... Migros ni al land' de rus'.  
.....

'230 'Exaudi nos, Domine'\* –  
..... Ĉiuj manku, sed ni ne! .....

'231 'Pleni sunt coeli'\* – .....  
Ni bonfartu ĉe li! .....

'232 'Aequum et salutare'\* –  
..... Li al ni pagos kare. ....

'233 'Salvator mundi'\* – .....  
Je gras' abundi! .....

'234 'In te, Domine, speravi'\*  
– ..... Decas apetiton havi. ....

'235 'Libera nos a malo'\* – .....  
Sep ŝinkoj – eta regalo! .....

'236 'Exaudi, Domine,  
orationem meam'\* – ..... Donu  
kolbason, se ŝinko ne jam. ....

'237 'Ex profundis clamavi ad  
te, Domine'\* – ..... Por mi  
vinon, por vi ne! .....

'238 'Dona nobis pacem'\* –  
..... Kun mastrinoj sur  
matracen! .....

'239 'A porta inferi'\* – ..... Sed  
ĝi restu inter ni! .....

'240 'Mea culpa, mea maxima culpa'\* – ..... Kiu fuŝas la miraklojn, tiu estas stulta. ....

'241 'Kyrie eleison'\* – ..... Faru ni komercon! .....

'242 'Et ne nos inducas in tentationem'\* – ..... Monon prenu ankaŭ senordone! .....

'243 'Sicut erat in principio et nunc et semper'\* – ..... Memnenion donu, sed riĉiĝu per ŝtel'! .....

'244 'Et in saecula saeculorum. Amen'\* – ..... La infer' profiton donas tamen. ....

## **,& Deka kanto.**

### **Konkurso:**

'245 Stepan herbon taŭzas vento : de la Nigra Maro; jen al Kiev ŝtorme kuras ; la kandidataro.

(×: **Paŝu firme sur plank'**, ; **ŝuojn trivu ankaŭ**, ; **regu dio**, ; **kie dancos ni sen mank'**.)

'246 Blovas vento okcidenta, ; Kiev polve dronas. ; Ĉiu klaĉas pri l' alia, ; pri si fanfaronas. ....

'247 Sub sigelo telergranda ; roma Pap' dekretas: ; "Eĉ moneron tiu greka ; kred' ne valoretas. ....

'248 Ho, ne ĉiu eklezio ; estas ja samspeca – ; Nur la roma estas tiu ; plej eklezieca!" .....

'249 Sub sigelo pladogranda ; Patriark' rebatas: ; "Lin ne kredu, Vladimiro, ; Antikrist' vin flatas! .....

'250 Ho, ne ĉiu eklezio ; estas ja samspeca – ; Nur la greka estas tiu ; plej eklezieca!" .....

'251 "Ŝulem, ŝulem!"\* skribis ankaŭ ; sinedri'\* hebrea: ; "Nek la roma, nek la greka! ; Pravas la mosea! .....

'252 Ho, ne ĉiu eklezio ; estas  
ja samspeca – ; Nur la juda  
estas tiu ; plej eklezieca!" .....

'253 Ankaŭ la islama Mufti\* ;  
laŭte krias peton: ; "Murdu l'  
hundojn nekredantajn, ; sekvu  
Mahometon! .....

'254 Ho, ne ĉiu eklezio ; estas  
ja samspeca – ; La islama  
estas tiu ; plej eklezieca!" .....

'255 En ĉarkorto hundoj oston  
; morde intertrenis. ; Ankaŭ la  
aliaj sektoj ; konkurenci venis.  
.....

'256 Nur diablo konas ĉiujn, ;  
sed la interklaĉoj ; estis bona  
lern-okazo ; por vendistinaĉoj.  
.....

'257 Kaj precipe bone fartis ;  
ĉiuj maklerantoj ; manĝis  
kukojn nur, kaj trinkis ;  
brandon po potkvantoj. ....

'258 Kaj ĉar tiam tre prosperis  
; la makler-metio, ; oni nomas  
makleriston ; ankaŭ "Vip' de  
dio". .....

## <& Klarigoj al La bapto de caro Vladimir:

'12 Prebendo, eklezia ofico,  
kun kiu estas ligita rento.

'20 Korto, la cara kortego.

'34 Estas kutimo doni al la  
gastoj iom da manĝaĵoj el la  
festeno por iliaj familianoj.

'45 En la tempo de la frua  
kapitalismo la popolo rigardis  
la industrion kiel kaŭzon de  
sia mizero: la teksmaŝinoj  
rabis la panon de la metiistoj.

'57 Vilaĝo Briksen estis  
ekzilloko de la verkinto.

'59 Turkan pipo, aŭ nargileo,  
estas pipo kombinita kun  
vazo, en kiu laviĝas la fumo  
tra akvo.

'73 Ŝanelo, (ĉi tie) akvofluejo,  
akvokanalo.

'97 Lasta Ŝmiro, kristana  
sakramento, kiun kredanto  
ricevas antaŭ sia morto –  
sacerdoto preĝas super  
malsanulo ŝmirante lon per  
sankta oleo.

'98 Nestor\*, kronikisto pri la  
frua parto de rusa historio.

'105 Ŝpilbergo, iama citadelo  
kaj ŝtata karcerulo kun misfamaj  
kazemataj ĉeloj en moravia  
urbo Brno (Bruno).

'106 Kufŝtajno, urbo kun ŝtata  
karcerulo en Tirolo, Aŭstrujo.  
Kaj ĝin kaj Ŝpilbergon uzis  
aŭstra reĝimo por politikaj  
malliberuloj. ; "Dio gardu nian  
reĝon!" ŝtatan himnon  
parodias. ; Vortludo, kvazaŭ la  
ĉeĥa vorto "slavik"  
(najtingalo) devenus el verbo  
"slaviti" (glorigi).

'110 Por kristana komunio oni  
bakas panetojn kaj diras ke ili  
estas la korpo de Jesuo, filo de  
dio.

'111 Ĵonglaĵo, lerta artifiko.

'121 Bapti bieron, almiksi en  
ĝin akvon.

'129 Dekonaĵo, depagoj el la  
rikolto, kiujn pagis la  
kredantoj al sia pastro.

'130 Preĝejistoj, laikaj preĝej-  
helpantoj, pedeloj,  
sakristianoj.

'132 Signo, malbona aŭguro.

'143 Orgen-tretanto – balgon  
de orgeno oni blovigas per  
tretado.

'145 Maljuna ciganino, petante  
almozon, kortuŝe lamentas kaj  
ploras.

'160 Naturpaga servo – en pli  
malnova tempo oni pagis al



siaj dungitoj ne per mon, sed per naturaĵoj kiaj greno, viando, biero, ligno kaj tiel plu.

'170 Ŝtatpaperoj, ŝtataj obligacioj. ; 'al pari' (itale), kurzo laŭ nominala prezo de obligacio.

'177 Jezuito, ano de katolika ordeno kiu energie kaj laŭplane militis kontraŭ reformismo kaj estis la plej forta apogilo de roma eklezio kaj papa politiko. ; Derviŝo, islama monaĥo.

'182 Marŝalo Buŝaperto reprezentas la senskrupulan militistan konduton rilataŭ subuloj kaj popolo.

'188 Pano, vino kaj latino, esencoj de katolika liturgio.

'189 Temas pri frazo de evangelio de Johano (19-a ĉapitro, 11-a strofo) "Vi havus nenian povon kontraŭ mi, se ĝi ne estus donita al vi de supre". El tiu tezo oni volis dedukti, ke ĉia ŝtatpotenco devenas de la ĉielo (dio) kaj sekve estas netuŝebla.

'191 Franta Ŝumavsky, ĉeĥa leksikologo (1796-1857) kiu en sia germana-ĉeĥa vortaro forgesis ĉe la vorto Kamarille indiki ties genron gramatikan. Havliček kompletigas lian

misatenton aludante pri diro en la kroniko de Nestor ke caro Vladimir estis "trafita de avideco je virinoj".

'194 Meretrico, prostituitino aŭ amatino kiun viro por si tenas kaj pagas.

'195 Kaciko, origine vilĝestro aŭ tribestro indiana, hispane kaj sudamerike ankaŭ kun metafora signifo "elekto-agitisto, politikisto kiu en certa teritorio gvidas la elektojn". Havliček mokaludas eble la germanan princon-elektiston de Hessen-Kassel Vilemo Dua, kiu surtroniĝis en 1821 kaj mortis en 1847, neamata despoto kun meretrico.

'197 Profesiaj hundo-mortigistoj havas ĉiam rezervon da viando naŭza el hundoj kaj aliaj kadavroj. La verkinto per ĉi tiu komparo volas diri ke la cara kamarilo estis same multnombra kaj ĉiam je dispono, sed ankaŭ same nebonvena.

'205 Kiev, historia ĉefurbo de Ruslando.

'211 Germana gazeto "Augsburger Allgemeine", tiutempe tre disvastigata.

'212 Latine elparolu "Lakri me Kristi" (Larmoj de Kristo),

estas speco de itala vino. ;  
Vatikano estas ŝtato, urbo kaj  
palaco en Romo de la katolika  
papo.

'216 Latine "Te Deum  
laŭdamus" (Vin, Dio, ni  
laŭdas).

'217 Latine "Dies ire, dies ila"  
(La tago de l' kolero, tiu tago).

'218 Latine "Te rogamus, aŭdi  
nos" (Ni vin petas, aŭdu nin).

'219 Latine "Gloria in  
excelsis Deo" (Gloron al Dio  
en la supera alto).

'220 Latine "Kredo in unum  
Deum" (Mi kredas je unu  
Dio).

'221 Latine "Orate fratres"  
(Preĝu, fratoj).

'222 Latine "Benediktus, kvi  
venit" (Benita estas, kiu  
venas).

'223 Latine "Sanktus, sanktus,  
sanktus" (Sankta, sankta,  
sankta).

'224 Latine "In nomi ne Domi  
ni" (En la nomo de la Sinjoro).

'225 Latine "Dignum et  
justum est" (Estas digne kaj  
juste).

'226 Latine "Domi nus vobis  
kum" (La Sinjoro kun vi).

'227 Latine "Sankta Dei Geni  
triks" (Sankta Di-Patrino).

'228 Latine "Agnus Dei, kvi  
tolis pekata" (Ŝafido de Dio,  
vi forportas le pekojn).

'229 Latine "Veni, Sankte  
Spiri tus" (Venu, Sankta  
Spirito).

'230 Latine "Eksaŭdi nos,  
Domi ne" (Elaŭdu nin,  
Sinjoro).

'231 Latine "Pleni sunt celi"  
(Plenaj estas la ĉieloj).

'232 Latine "Ekvum et  
salutare" (Ĝuste kaj  
savodone).

'233 Latine "Salvator mundi"  
(Savinto de l' mondo).

'234 Latine "In te, Domi ne,  
speravi" (En vi, Sinjoro, mi  
esperis).

'235 Latine "Libera nos a  
malo" (Senigu nin de  
malbono).

'236 Latine "Eksaŭdi, Domi  
ne, oracionem meam"  
(Elaŭdu, Sinjoro, mian  
preĝon).

'237 Latine "Eks profundis  
klamavi ad te, Domi ne" (El  
profundo mi vokis vin,  
Sinjoro).

'238 Latine "Dona nobis  
pacem" (Donu al ni pacon).

'239 Latine "A porta inferi"  
(For de la pordo de la infero).

'240 Latine "Mea culpa, mea  
maksi ma culpa" (Mia kulpo,  
mia plej granda kulpo).

'241 Greke "Kyrie eleison"  
(Sinjoro, kompatu).

'242 Latine "Et ne nos indukas  
in tentacionem" (Kaj ne  
konduku nin en tenton).

'243 Latine "Sicut erat in  
principi o et nunk et semper"  
(Kiel estis en la komenco, kaj  
nun kaj ĉiam).

'244 Latine "Et in seku la  
sekulorum. Amen" (Kaj por  
ĉiam kaj eterne. Amen).

'251 Hebrea saluto "ŝalom"  
laŭ elparolo de judoj orient-  
eŭropaj. ; Tribunalo kaj plej  
alta konsilio de judaj pastroj  
(rabenoj).

'253 Eklezia kaj jurista  
altrangulo de islama religio. >

## & Vojaĝoj kaj aventuroj de sinjoro Longkrurulo:

< Rekante 25 el 49 batoj por strofo, entute 7938 dum 1 horo kaj 30 minutoj. Verkis Dreves Uitterdijk (Hilversum, 1927). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

(<:49>/SoSo dodo mire Ti; rere fami doLa So; mi rere dodo; SoSo dodo mire TiTi; rere fami doLa SoSo; mi rere dodo; fami domi somi rere; TiTi TiTi LaLa SoSo; LaLa fafa somi so; so rere mire Ti LaTi doLa So LaTi do mire Tido LaTi do do o; )×162 )+

### (&Strofoj:

'1 /Buboj, venu, aŭdu vi, ; kiam nun rakontas mi,

(×:; **Kara fratino ;**)

Kion spertis Longkrurulo, ;  
Pasiplena bestkaptulo,

(×:; **Kara fratino ;**)

Pro Ursula la fratino, ; Tre tedita je la fino.

(×: **Ho fratino sekvu min ; Estas fratuloj ni el la sama sango kaj kreskis ni kune en la mondon.**)

'2 Aŭdu ke, pro turmentado, ; sekvis lia forkurado. .... Ke baleno, monstra besto, ; Lin englutis sen protesto, .... Ĝis li poste, kun amiko ; Estis sklavo en Afriko. ....

'3 Ĉion tion, mi plej bele ; Rakontados tre fidele, ....Kaj se ofte strange sonas, ; Mi la veron certe konas, ....Aŭdu nun, mi, violone ; Ĝin prikantos do tre bone. ....

### ,&1. Kiel sinjoro Longkrurulo ĝojegas pro papili-kaptado:

'4 Frumatene, Longkrurulo ; Jam saltetas kiel pulo. ....Kapti belajn papiliojn, ; Kaj skarabojn aŭ akridojn. ....Jen plezuro, kiun li, ; Arde ŝatas, ĉiam pli. ....

'5 Post ĉasado kun vespero, ; Ja, jen fine ekzemplero. ....Tre admiras li la belon. ; Pinglas ĝin sur la ĉapelon, ....Kaj ne oran reĝon kronon ; Li preferus, nek eĉ monon. ....

'6 Kiam li nun pro lacego, ; Hejmen kuras kun ĝojego, ....La kaptaĵo multkolora ; Estas por li grandvalora, ....Kia reĝo, eĉ plej riĉa, ; Povus esti pli feliĉa? ....

'7 Por admiri la kaptiton ; Li forlasas eĉ la liton; .... Malferminte nun la keston ; Prenas li la belan beston. ....Tre kontente li ridetas, ; Singardeme ĝin remetatas. ....

'8 Eĉ dumnokte, kun la ĉapo ; Ĝis la nazo sur la kapo, .....Revas li pri aventuro ; Kun insektoj sur la muro, .....Dum skaraboj ĉieloke ; Sin salutas reciproke. ....

'9 Baldaŭ post la laŭta voko ; De l' najbara vigla koko, .....Li jam pensas en ĉemizo ; Pri venonta ĉasa skizo. ....Certe, sen fratin-admono ; Forgesiĝus pantalono. ....

## **,&2. Kiel sinjoro Longkrurulo adiaŭe skribas al sia fratino:**

'10 Sed jen fakto bedaŭrinda: ; La fratino malaminda .....Ĉiutage lin insultas ; Kaj petegon ne aŭskultas, .....Ĝis en li vekiĝis plano, ; Skribis li per propra mano: ....

'11 "Ursula, fratino kara, ; Min allogas land' transmara, ..... Ameriko – en arbaroj, ; Tie vivas insektaroj! .....Iros tien mi, karulo. ; Ne forgesos vin Krurulo!" .....

'12 Ve, la skribo ĵus finita, ; Jen alveno tro subita: .....Ursul' legas la leteron... ; Li, konante la koleron ..... De l' fratino koramata, ; Tremas, tute timigata. ....

'13 Ruĝkolora kiel sango, ; Ŝiras reton ŝi de l' stango, .....Pugne batas, raŭke krias, ; ĝis li ne sin savi scias, .....Pala, trema, la timulo ; Tuj sin kaŝas en angulo. ....

'14 "Vi fripono, vi stultulo!... ; Kaj mi, sola mizerulo, ..... Tie restus ja dolore? ; Vi ne amas min tro kore?" ..... "Ho", li diras, "forvojaĝi, ; Mi ne povus ja kuraĝi!" .....

'15 Manĝi, trinki, li ne povas, ; Ĝis la tason li forŝovas. ....Kun koloro de la morto ; Sidas li sen ia vorto. ....Ĝis Ursula kun kompatato ; Dolĉe diras: "Kara frato... .."

'16 Nu, por festi la decidon, ; Mi nun ludos: La revidon",  
.....Akravoĉe, penetrante, ; Ŝi lin distri volas kante. ....Furioze grumblas li: ; "Kuru al la luno vi!"  
.....

'17 Fine krias li kolere: ; "Lasu min!... ĉar fakte, vere..." ..... "Vi restados tie ĉi!" ; Furioze blekas ŝi... .....Frapas – tablo renversiĝas, ; Tasoĵ kaj teler' rompiĝas. ....

'18 Li atnedas kun pacienco, ; Ĝis la nokt' por la intenco: .....Kaj mallaŭte, sen brueto, ; Li forrampas tra trueto. .... Kaŝ'iradas, sed rapidas ; La fratinton ne revidas. ....

### **,&3. Kiel sinjoro Longkrurulo foriras kaj ŝipe forlasas Eŭropon:**

'19 Nun feliĉe el la domo, ; Li sin sentas ĝoja homo, .....Kaj kun reto kaj ĉapelo ; Vokas lin la alta celo. .... La publiko, ne kompleza, ; Pensas: Estas li freneza? .....

'20 Sed jen granda embaraso ; Dum la gaja nokta ĉaso: .....Strigo, en la nokt' kaŝita, ; Estas de li timigita, .....Tute ĝi lin nun retenas, ; Hotelĉambro do li prenas. ....

'21 Baldaŭ poste, en bonordo, ; Venas li ĉe marobordo, .....Kie ŝipo forironta ; Estos lia hejm' estonta, .....Entuziasmo vipas lin ; Laŭte la salutas ĝin. ....

'22 Per maristo nun remata ; Al la ŝipo dezirata, .....Gaje li saluton svingas: ; "Amerikon mi atingos! ..... Ursula'n mi nun proridos ; Kaj neniam ŝin revidos!" .....

'23 Ve, apenaŭ bonŝirmita, ; Li sin sentas vangfrapita: .....La fratino, tre amante, ; Lian planon supozante, .....Serĉis lin ja sen prokrasto ; Kaj sin kaŝis post la masto. ....

'24 Ĉar ŝi ploras kaj ĝemadas, ; Li sin fine certigadas: .....Li dumvive ne plu kaptos ; Al saĝeco sin adaptos, – .....Post solena certigado ; Surferdeka promenado. ....

'25 Por gajigi lin, blindulo ; Ludas  
ŝi kun Longkrurulo. .... Kaj komike  
liprogresas, ; Longatempe ne  
sukcesas, ....Ĝis jen fine li ŝin  
tenas, ; Ambaŭmane ĉirkaŭprenas.  
.....

'26 Nun Ursula kun la tuko ;  
Firmiligita en la nuko. –  
.....Longkrurulo tuj profitas, ; Laŭ  
ŝtuparo supren glitas. .... Sola  
Ursula palpadas, ; Sensukcese lin  
serĉadas. ....

'27 Staras li jen kun doloro ;  
Malesperon en la koro. ....  
Senvalora nun la vivo, ; Kruelega  
perspektivo! ....Malfeliĉa li sin  
sentas. ; La promeson li jam pentas.  
.....

'28 Pro la ruzo de la frato, ; Ursula  
sen rezzultato ....Palpas, serĉas,  
ĉion movas, ; Sed nenie ŝi lin  
trovas. ....Ĝis la tukon ŝi fortiras ;  
Kaj pro la soleco miras. ....

#### **,&4. Kiel sinjoro Longkrurulo saltas en la maron, kaj ĝiaj sekvoj:**

'29 Kun tumult' ŝi supren venas, ;  
Longkrurul' ĝin tuj komprenas,  
.....Restas firme decidita ; Por ne  
esti reprenita... ....Eksterŝipen  
saltas li ; Kun plej korŝiranta kri'.  
.....

'30 Ŝip-' en malproksim' videbla! ;  
Ĉi ĝi estas atingebla? ....Sed sen  
timi la ondaron ; Ankaŭ ursul' en la  
maron. – ....Tra binoklo submarin' ;  
La ŝipestro vidas ĝin. ....

'31 La bravulo ne pripensas, ; Tuj  
ŝin savi li intencas, .... Kun ĉapel'  
kaj brila glavo ; Li nur pensas al la  
savo. .... Plons!... La kvara de la  
listo ; Aŭdas ĝin: la direktisto. ....

'32 "Rekompenco por savilo!" ;  
Krias li tra la vokilo. ....Kaj amase  
la ŝipanoj ; Saltas maren kiel ranoj.  
.....Ĉiu hom' en ĉiu aĝo, ; Riskas  
droni pro la naĝo. ....

'33 La ekzemplo komunikas, ; Sin  
al bestoj, kaj efikas. .... Ĉiuj saltas  
en la maron, ; Vidu nur la grandan  
aron: .... Bov', bovino, hundoj,  
katoj, ; Ĉevalino, musoj, ratoj. ....

'34 Jen proksime sur la maro ; Estas  
Turko rabistaro, ....Ili vidas la  
spektaklon, ; Opiniis ĝin miraklon,  
..... Sed eltiras ĝustatempe ; Ilin,  
malsekegajn, trempe. ....

'35 Ursul' preskaŭ mortis, svenas. ;  
Sed ŝin lerte Turko prenas. –  
.....Longkrurul' nun tre ĝojiĝas, ;  
Lia kapo subakviĝas. – .....Iri kun  
ŝi: kia sorto! ; Pli bonvena eĉ la  
morto, .....

'36 Ĝis balono dikigita ; Pro la akvo  
englutita, .....Antaŭ krevo aŭ  
eksplodo, ; Finu nun la epizodo.  
.....Tial nigra insuleto ; Estas por li  
surprizeto. ....

'37 Ve, ne arbo aŭ kreskaĵo ; Sur la  
plata ebenaĵo! ..... Ĝi sin movas, ho  
teruro! ; Naĝas per rapida kuro!  
.....Tuj nun subakviĝas ĝi, ;  
Malaperas ankaŭ li. ....

'38 Jes, mallonge nur dirite ; Ĝi  
englutis lin subite. ....Tra la gorgo  
de baleno ; Flugis li sen ia peno. ....  
Ursula ne povis provi ; Nun laŭ  
eblo lin trovi. ....

## **,&5. Kiel sinjoro Longkrurulo amikiĝis en la baleno kaj plu:**

'39 Kiel sekvo de l' atako ; Alvenint'  
en la stomako, .....Jen li trovas  
antaŭulon, ; Tute glatan senharulon.  
.....Strangan kuriozan tipon ;  
Firmtenante iun ripon. ....

'40 Kaj la dikuleto diras: ;  
"Samsortul', mi forte miras: .....La  
peruko forbloviĝis; Ĉi nenie  
retroviĝis. ....Sensukcese mi  
penadis, ; Jam tri tagojn  
ŝnurkaptadis." .....

'41 Longkrurul' respondas: "Nu, ;  
Pli ol unu povas du, .....Mi  
klopodos helpi vin." ; "Ho, mi kore  
ŝatos ĝin! ..... se ja eble vi sukcesus  
; Mi neniam ĝin forgesus." .....

'42 Iutage ili vidis ; Dum en ripoj ili  
sidis .....Ke de l' besto tre malsata ;  
Estas grupo englutata. .... Vere  
estis korŝiranta, ; La grupeto  
lukteganta. ....

'43 Sin ekmontris muzikisto ; Kun  
gravega predikisto, .....Kun servist'  
kaj Petronela ; La filino vere bela  
.....kiu ploris kriegante, ; Mopson  
sur la brak' tenante. ....

'44 La teruron forgesinte ; Kaj  
kuraĝon repreninte, .....Longkrurul'  
kun ŝi promenas ; Kaj ŝin ĉe la  
brako tenas. ....Ho, ravegaj la  
momentoj! ; Ambaŭ estas tre  
kontentaj. ....



'45 Longkrurulo' nun pripensanta: ;  
Ke li estas ŝin amanta, .....Petas pro  
la amikino ; De la pastro je edzino.  
..... Jes", li diras, "tute prava! ;  
Prenu ŝin: ŝi estas rava." .....

'46 Balo en balena ventro. – ; Estas  
stranga festa centro. .... Tiom bele  
kaj gracie ; La geedzoj dancas tie,  
..... Ke nenie en la maro ; Estis pli  
feliĉa paro. ....

'47 Sed pli la dancad' kaŭzigas ; Ke  
la besto malsaniĝas. .... Ĝi, pro  
spasmoj estas trema, ; Pala, naŭza  
kaj vomema... .... Ho, Dikulo, vin  
gardadu ; Kaj la ripon firmitenadu!  
.....

'48 Penjo pensas nur zorgadi ; Ne la  
mopson platpremadi. .... Ŝi ne  
tenas. – Tuj rompiĝas ; Nun la  
ĉeno... ĝi disiĝas – .... Kaj kun bruo  
penetranta ; Jen la monstro  
vomeganta... .....

## **,&6. Kiel sinjoro Longkrurulo tre ĉagreniĝas, sed fine liberiĝas:**

'49 Ho, feliĉa nun la veno: ;  
Trimastulo' el Antverpeno ..... Per  
hazardo preterpasas ; Ne sen helpo  
ilin lasas. – .... La kvar homojn kun  
la hundo ; Oni savis el la fundo. ....

'50 Sola restis Longkrurulo ; Kun  
amiko Dikventrulo. .... Ankaŭ ja  
por la baleno ; Tio estas grand'  
ĉagreno, .... Tre fatala malhelpado ;  
Por regula digestado. ....

'51 Por la ambaŭ tre dolore, ;  
Preskaŭ ili ĝemas ĥore. .... La  
vidvecon tuj suferi ; Krur- ne povas  
ĝinb toleri, ....Ploras, volas ne  
paroli, ; Diĉjo penas lin konsoli. ....

'52 Jen la besto ree kraĉas ; Plej  
elfunde ĝi vomaĉas. .... Kiel  
keglojn dum la rulo ; Kiel falon de  
drinkulo, .... Ilin skuas la bestego ;  
Ĝis svenado pro spirego. ....

'53 La balen' dolore ĝemas ; Ke la  
tuta korpo tremas. .... El la flanko  
gutas sango. – Dikventrulo', kun pala  
vango, .... Ekrigardas, miras tre: ;  
Tion li komprenas ne. ....

'54 Helpo fine alvenanta ; Liberigon  
promesanta: .... Fiŝkaptista  
entrepreno, ; Mortpafita la baleno.  
.....Harpunego ĝin traboris ; tiu  
vundo ĝin doloris. ....

'55 Sur la teron nun trenata, ;  
Pecigata, debuĉata. – .....Sed la  
faŭkon malfermante... ; Fenomeno  
mirigante: ..... "Bonan tag'" de  
Longkrurulo, ; Sam' salutis  
Dikventrulo. ....

'56 De Krurul' la tuja peto: ; Pri la  
lasta margazeto, .... Dum Dikulo  
krias: "Riĉa ; Estas mi kaj plej  
feliĉa!" .....Li retrovis la hararon, ;  
Traserĉante la triparon. ....

## **,&7. Kiel sinjoro Longkrurulo venas al la nordpoluso kaj kio okazis:**

'57 Malvarmeco... brr, senlima;  
Nordpoluso tre proksima,  
.....Hajlas, neĝas, brr, la frosto ;  
Trapenetas ĝis la ostoj. ....Ĉiuj  
membroj rigidiĝas, ; Ili tute  
sentsentiĝas. ....

'58 Glaciiĝis jen la sango, ;  
Malmoliĝis nun la vango. .... Ili  
falas do sen krio, ; Kuŝas tute sen  
konscio, ....Dum sur dorso kaj sur  
brusto ; Formas sin galcia krusto.  
.....

'59 La kaptado nun finita ; Kaj la  
ŝipo plenŝarĝita, .... Oni do, ĉar ili  
mortis, ; Ilin al la ŝip' transportis.  
..... Oni pensis: La trovaĵo ; Estas  
vera vidindaĵo. ....

'60 Ĉe la masto pendigitaj, ; La  
figuroj prujnkovritaj, .... Ventre  
blankaj de koloro, ; Ŝajnis formoj el  
marmoro. .... Mute svingis sin kun  
vento, ; Ŝtonigitaj kaj sen sento. ....

'61 Per ventego forvipita, ; Per  
malvarmo frostigita, .... Ankaŭ jen  
la rabistaro ; Flosas en la norda  
maro. ....Ĝia tuta ekipaĵo ; Ŝajnas  
fresta konservaĵo. ....

'62 Balenŝipen transportitaj ; Nun la  
Turkoj etenditaj. ....Nur la estro  
kun Ursulo ; Pendigitaj ĉe krurulo,  
..... Estas vera beligaĵo ; Kiel masta  
ornamaĵo. ....

'63 Oni frojis alumeton ; por bruligi cigareton. .... Kaj fajrero per okazo ; Ĉe la Turko sub la nazo. ....Tuj ekflamas lia barbo, ; Forbruligas lin ĝis karbo. ....

'64 Pro la varmo bonfaranta ; Ilin ambaŭ revekanta .... Krur' kaj Ursul' reviviĝas ; Kaj la sango fluidiĝas. .... Ŝi lin kore ĉirkaŭprenas... ; Kvazaŭmorta li sin tenas. ....

'65 Ŝi lin prenas kaj tre miras, ; Rezultaton ne akiras, .... De la ŝnur' lin liberigas, ; Zorge rekte lin starigas. .... Sed rigida kaj senmove ; Tuj refalas li denove. ....

## **,&8. Kiel sinjoro Longkrurulo fine malfrostiĝas per la zorgo de sia fratino:**

'66 Ho, ŝi ploras, lin ja ŝatas, ; Lin per dolĉaj nomoj flatas, ....Aŭs karesas propramane... ; Ĉion ŝi klopodas vane: .... Liaj membroj rigiditaj, ; La okuloj plenfermitaj. ....

'67 Tamen batas lia koro; Ho, ne kaŭzo por angoro! ....Verŝas brandon ŝi sur tukon, ; Bruston frojas kaj la nukon, ....Tio donas tiklan senton... ; Preskaŭ ridas li momenton. ....

'68 Kion ŝi pripensi povas ; Ŝi klopodas kaj ĝin provas: .... Branda, tea brulvarmego ; Ŝi enverŝas – la ŝvitego .... Elfluadas nun torente ; Ursul' ridas tre kontente. ....

'69 Por lin tute malfrostigi ; Ŝi nun volas perfortigi .... Kaj lin ligas senhezite ; Sur rostilo hejtigita. – .... Nun per fajro la varmigo ; Tuj rezultos ja sanigo. ....

'70 Sed nenia filozofa ; Pensus ja ke katastrofo .... Plej fatala nun okazos, ; Danĝerigo eĉ minacos... .... Ĉar la varmo disvastiĝas ; Kaj la Turkoj do vekigiĝas. ....

'71 Sovaĝeco tuj revenas ; Kaj la glavon ili prenas, .... Supren kuras kaj trapikas... ; Nia bildo ĝin indikas. .... Pro kristana sang' malseka ; Estas baldaŭ la ferdeko. ....

'72 Ursul' pala sed taktika, ; Nun virino tre praktika: .... "Salamalek!

Jen sekreto, ; Je la barbo de l'  
Profeto! ..... Jen, pardonu via  
Moŝto, ; De kristana hund' la roŝto."

.....

'73 Jam duone sekfumita, ;  
Brunbrogita, forbrulita, .....  
Longkrurulo, la viktimo ; De l'  
hardiga vivreĝimo, ..... Kriis laŭte:  
"Liberigu, ; El varmego min  
forigu!" ..... '

## **,&9. Kiel sinjoro Longkrurulo kaj sia dika amiko, savitaj, iras inter la turkojn:**

'74 Sed la Turkoj estas, ve! ;  
Indulgemaj tute ne. .... Savi vivon,  
solrimedo ; Estas: ŝanĝi nur je  
kredo. .... Li do prenas la turbanon  
; Lin faronta Muzulmanon. ....

'75 Svingiĝante ĉe la masto ; Kaj  
tuŝate de l' kontrasto, ..... Jen  
Dikulo ekmalfrostas, ; Li degelas –  
jam ne roŝtas. .... Helpe de  
prudenta glito ; Staras li nun,  
renaskito. ....

'76 Pro mirego senparole ; Li  
staradas kontraŭvole, ..... Jen la  
Turkoj klarvideblaj ; Ho, mirakloj  
ja ne eblaj! ..... Kio, kie li nun estas,  
; Plenkafita por li restas. ....

'77 Kaj pli, unu islamulo ; Tute  
ŝajnas Longkrurulo: ..... Korpo osta,  
longa nazo, ; Kruroj longaj kaj  
malgrasaj; ..... Li ĝin tute ne  
komprenas ; Kaj pro surprizego  
svenas. ....

'78 Longkrurul' lin bonvenigas ;  
Kajla staton tuj klarigas. .... Diĉjo  
la danĝeron vidas, ; Tial tuj sin  
Moslimigas ..... Kun turbano sur la  
kapo, ; Tute ŝajnas dika rapo. ....

'79 Ursul' fraton nun karesas ; Ĝis li  
sankte ŝin promesas, ..... Ke kun ŝi  
li hejmen iros, ; De vojaĝoj sin  
retiros. .... Sur papero sigelita ; Jen  
kontrakto nun farita. ....

'80 Sed la penton tuj ekestas, ; Post  
subskribo forte restas: ..... Ursula  
lin hipnotigis, ; Malkuraĝa ŝi lin  
igis. .... Li, la fama Longkrurulo ;  
estas vera timegulo. ....

'81 Jen subite li ĝojiĝas, ; La vizaĝo  
tuj heliĝas. .... Ho rimedo liberiga!  
; Solvo brile kontentiga! – ..... Li  
sen plua pripensado ; Diras al la  
kamarado: .....

'82 "Kara vi, hontinde estus ; Se vi  
sen edzino restus. .... Kaj ekzistas  
ja virino, ; Kiu estas anĝelino! .....  
Ja, mi nomus vin stultulon, ; Se vi  
prenus ne Ursulon!" .....

## **,&10. Kiel sinjoro Longkrurulo ree volas foriri, kaj la rezultato:**

'83 "Jen ideo, verdirite!" ; Krias  
Diĉjo senhezite. .... Kaj li arde  
enamiĝas ; Ursula fianĉiniĝas. ....  
La ekstazo, nun dumvoje ;  
Longkrurulo' ĝin vidas ĝoje. ....

'84 Ho, feliĉa sur la maro ; Estas  
nun la juna paro. .... Havas nun  
Kruro' ripozon. ; Diĉjo kisas  
dolĉan rozon, .... Kiun lia fianĉino ;  
Lin oferis, amatino. ....

'85 Fine ree la marbordo! ; Krur'  
nun igas ĝin en ordo, .... Diĉjo'n al  
Ursulo' prezentas, ; Diras: "Urnjo, vi  
konsentas? ..... Ĉar ja havos edzon  
vi, ; Tial nun disiĝu ni!" .....

'86 "Ne, restadu, ci ruzulo!" ; Laŭte  
blekas tuj Ursulo. – ..... Frato, pro  
teruro, svenas, ; Diĉjo flanken de li  
venas. .... Mute servas nun la paro ;  
Ursulo'n je trotuaro. ....

'87 Rezultato tre plendinda ; Por la  
ino koraminda: ..... Nerva krizo tuj  
alvenas... ; Ursulo' tial ankaŭ svenas  
..... Kaj jen kuŝas do la trio ; Mute  
nun en kompanio. ....

'88 Ili riskas pro angoro ; Ne sin  
levi antaŭ horo... ..... Ho, la morto  
ŝin ektuŝas ; Jen senviva ŝi nun  
kuŝas! ..... Blanka rozo deŝirita, ;  
De la morto postlasita! .....

'89 Dolorplena la dikulo ; Kiel vera amemulo. .... Iom pli Krurul' kontenta: ; Ŝi almenaŭ nun silenta. – .... Miksaj sentoj do ekvenas ; Dum la korpon ili prenas. ....

'90 Laŭ decid' de l' maristaro ; Oni ĵetos ĝin al maro ..... Sed la mortintin' leviĝas, .... Kaj portintoj flanken iĝas. ; Kun kriego de teruro ; Komenciĝas la forkuro. ....

## **,&11. Kiel sinjoro Longkrurulo kaptludas kun la ekipaĵo:**

'91 Ho, la bona Kruĉjo jen, ; li forkuras, sed kien? .... Ĉirkaŭ li la grand-akvejo ; Neniflanke rifuĝejo. .... Senripoze jen antaŭen ; Sur la ŝipo nur ĉirkaŭen! ....

'92 Ursul' volas tuj lin preni ; Ĉiapove lin reteni, .... Tre rapide, eĉ flugante ; La ferdekon rondirante, .... Persekutas lin sen halto ; Volas kapti lin per salto. ....

'93 Eĉ la bona dikegulo ; Montras sin diligentulo, .... Ĉar la kapo en la nuko ; For de li eĉ la peruko, .... Ĉiam pli rapidegante ; Ilin sekvas li konstante. ....

'94 Ĉiuj Turkoj, ĝin vidante ; Kolektiĝas rondkurante, .... Plej rapide persekutas ; Ŝvito el la barbo gutas, .... Ĉiam kuras unutone ; Jen la tuto, eskadrone. ....

'95 La kokinoj kaj anseroj ; Kun kolomboj kaj paseroj ..... Ja, la tuta ŝipbirdaro ; Flugas nun en densa aro ..... Kun bruego surdiganta ; Estas daŭre ĝi sekvanta. ....

'96 Ŝuoj, ŝtrumpoj kaj laktujo, ; Tabloj, benkoj, kukumujo, .... Kapkusenoj kaj tondilo, ; Pluvombrelo kaj tranĉilo, .... Ĉio el la inventaro ; Nun sin miksis en la aro. ....

'97 Porko, bovo kaj bovino, ;  
Hundo, kato, ĉevalino, ..... El la  
kaĝoj ĉiuj venas ; Kaj la kuron  
partoprenas. .... Tre rapide, eĉ  
galope ; Ili sekvas nun multope. ....

'98 El interno de la ŝipo ; Bestoj  
nun de ĉiu tipo ..... Tuj aperas:  
musoj, ratoj, ; Araneoj, puloj,  
blatoj. .... Ĉiuj kune, sur la rando ;  
Kuras do la tuta bando. ....

'99 Tiel iras la amaso ; Ĉiam pli en  
kvazaŭĉaso, ..... Kuratingi lin  
klopodas, ; Ĝis la ŝip' sin  
akomodas, ..... Rondiranta kiel rado,  
; Kiel disko en turnado. ....

## **,&12. Kiel la saĝuloj de l' dej opinias la turnantan ŝipon kometo:**

'100 Pace sur la marorando, ; Jen la  
Dej de Alĝerlando, ..... Fumas  
grandan nargileon, ; Kun veziroj  
trinkas teon ..... Dorme dum la  
ondoj fluas, ; Ĉar terure li enuas.  
.....

'101 Fine en la malproksimo ; Ĉe la  
horizonta limo, ..... Li nun faras  
observaĵon. ; Strangan  
supernaturaĵon: ..... Gigantega  
turnludilo ; Aŭ fantoma korktirilo.  
.....

'102 Li kunvokas la saĝulojn, ;  
Ĉiujn klerajn kortegulojn, ..... Kaj  
demandas post alveno ; Kaŭzon de  
la fenomeno. – ..... Se ĝin ili ne  
sciigos ; Tiam ilin li pendigos. ....

'103 Tion certe li intencas. ; Ili,  
palaj, tuj komencas: ..... La  
objekton observadas, ; Multajn  
librojn tralegadas... ..... Malesperas,  
– ĉar, ho ve! ; Ankaŭ ĝin  
komprenas ne. ....

'104 Kiam la debatoj finas ; La  
plejmulto determinas .....Ke ĝi estas  
ja kometo. – ; Klarigita la sekreto!  
.....Estas nun traktat' verkata. ; Al la  
reĝo prezentata... ..

'105 "Reĝa Moŝto", ili diris, ; "La  
konvinkon ni akiris; .....Ĝi por vi  
signifas gloron, ; Altan plej  
ĉielhonoron! .....Kiel laŭdo de l'  
Profeto, ; Al vi venis jen kometo."  
.....

'106 Centmil' frankoj dividiĝis. – ;  
Sed... la ŝipo albordiĝis. – ..... La  
ŝipanoj duonsvenaj, ; Kapturniĝaj,  
makulplenaj, .....Ne plu pro la  
ĉirkaŭkuroj ; Povis stari sur la  
kruroj. ....

'107 Longkrurul' jam vomis devas. ;  
Ursul' kapdolore krevas. .... Dik',  
vomema kaj koliko, ; La Turkaro  
tre kritika. ....Ĉiuj sentas sin sen  
povoj ; En ŝancelaj palpaj movoj.  
.....

'108 Sed la Dej en la afero ; Ne sin  
regis pro kolero ..... Kaj pendigis  
sen prokrasto ; La klerulojn en la  
masto, ..... Ĉar li nun tre klare  
spertis: ; Ili false ja asertis. ....

### **,&13. Kiel sinjoro Longkrurulo kaj Dikulo sklaviĝas:**

'109 La kristanoj ĉiuj tri ; Estas  
sklavoj nun por li, .....Longkrur'  
peze ĉenŝarĝita ; Al la kampo tuj  
sendita, .....Devas jen, kruela puno,  
; Laboregi en la suno. ....

'110 Sed montriĝis ke Dikulo ;  
Estas vera kapablulo, .....Granda  
por la Dej trezoro. ; Kaj dumvive  
nun "doktoro", ..... Por la princoj  
elektata ; Kiel instruist' privata. ....

'111 Sed la princoj, tre ludemaj, ;  
Estas tute ne lernemaj. .... Ne  
alloga la laboro, ; Sed la dorso de l'  
doktoro, ..... Rajdi estas ja plezuro ;  
Kaj amuza aventuro. ....

'112 Dik' "instruas" tre talente, ;  
Ambaŭ ridas plenkontente, ..... Sed  
responde al admonoj: ; "Lernu por  
la lecionoj." .....Sonas: "Ho, ne  
volas ni, ; Sed ludadi ja des pli!" .....

'113 Dum tumulto surdiganta ; Jen  
la Dej nun eniranta ..... "Filoj miaj –  
ho, mi krii: ; Morgaŭ alfabeton  
sciu! ..... Aŭ je horo akurata ; Vi,  
doktoro, pendigata!" .....

'114 Diĉjo tremas pro teruro: ;  
Pendi estas ne plezuro. ....Li  
komencas tuj penadi ; Alfabeton  
ripetadi. – ..... Sed, aŭskultas la  
unua, ; Kion faras nun la dua? .....



'115 Alligita al la kruro ; De l'  
Dikulo estas ŝnuro. .... Kaj por tion  
plipezigi ; Iras trabon li alligi ....  
Kiam Diĉjo volis movi, ; Li  
ekmiris, ĝin ne povi. ....

'116 Poste ili forkuregas, ; El la  
pordo. Dik' petegas: .... "Karaj  
princoj, ho kompatu! ; Alfabeton  
ankaŭ ŝatu! ....Se ne ĝin al vi  
sciigos, ; Via patro min pendigos!"  
.....

## **,&14. Kiel la digna trio forkuras de l' sklaveco:**

'117 Nun li senespera estas, ; Nur  
forkuri al li restas, ....Sed la trabo  
lin tenadas ; Kiom ajn li ĝin tiradas,  
.....Savi vivon nur sukcesus ; Se la  
trabtirado ĉesus. ....

'118 Fine ja per ektirego ;  
Postlasiĝas la trabego. .... Sed la  
mur', kun granda bruo ; Ruiniĝas  
pro la skuo. .... Tuta ĉambro  
frakasiĝas ; Diĉjo preskaŭ  
frezeziĝas. ....

'119 Do li saltas timigita ; Tra  
fenestro malfermita. ....Sed la trabo  
ja ne pasas ; Kap' malsupren nur lin  
lasas. ....Kaj terura pozicio ; Pendas  
likun akra krio. ....

'120 Tuj la princoj nun aliras ; Jen  
bedaŭras, kaj jen miras, ....Helpi ili  
nepre volas ; Pri ludado ne parolas,  
..... Sed sen ia aparato ; Savas lin de  
tiu stato. ....

'121 Jen en stara pozicio, ; Tuj  
revenas la manio. .... For sin savi  
kuregante ; La trabegon  
kuntrenante, ....Kvankam tiu  
malhelpaĵo ; Vere estas sensencaĵo.  
.....

'122 Ursul' vidas la kuranton; Por  
ne perdi la amanton, ....Tuj lin  
sekvas decidite ; Per la glavo  
provizite. – .... Ho, ŝi certe lin  
defendos: ; Absolute li ne pendos.  
.....

'123 Intertempe frat' amata ;  
Punlabore okupata, ..... Sub  
kontrole de gardisto. ; Estas kampa  
laboristo. ....Jen batata kaj ŝvitanta  
; Sola kaj malesperanta. ....

'124 Iutage li ekvidas, ; Ke fratino  
forrapidas. .... Li terure ektimiĝas, ;  
Al arbaro forpeliĝas .....Kaj sur  
kverko altkreskita ; Sin tenadas nun  
kaŝita. ....

## **,&15. Kiel pro la forkuro ĉiuj enloĝantoj pereigas:**

'125 La branĉaro estas dika ; Kaj la  
trunko tre fortika, .....Sed la  
spionin-okulo ; De la bonfratin'  
Ursulo .... Baldaŭ ekrimarkis ĝin ;  
Kaj laŭvoĉe vokas lin. ....

'126 Li sin tenas surda-muta ; En la  
alta trunko kruta: .....Li preferas la  
sklavecon – ; Nur ne ŝian  
trudemecon. .... Kaj plej feliĉiga  
trovas ; Ke ŝi ja ne grimpi povas.  
.....

'127 Al la trabo kuntrenata ; Jen  
danĝero alligata:... .....Pro frotado  
kontraŭ tero ; Baldaŭ montras sin  
fajrero, ..... Kiu kreskas, ve, Dikulo  
; Ĝis, timiga fajra brulo. ....

'128 Seka herbo kaj kreskaĵo ; Estas  
bona bruligaĵo .....Ĉieloke flamoj  
lekas, ; Pro terur' leonoj blekas, .....  
Kiu vivas, jen sen ordo ; Kuras al la  
mara bordo. ....

'129 Longkrurulo ankaŭ flaras ; La  
bruladon... sin preparas, ..... Jen la  
arbon nun forlasi ; Kaj la flamojn  
tuj trapasi, .....Kiam li malsupren  
venis, ; Jam la trunko fajron prenis.  
.....

'130 Ursul' lian manon prenas ;  
Kontraŭvole lin kuntrenas,  
.....Sekvas Dik' kun laŭta ploro. ;  
Homoj, bestoj nun en ĥoro .....  
Bruas, blekas kuregantaj. – ; Ĉie  
scenoj kortuŝantaj. ....

'131 Ho, la fajro sin etendas, ; Ĉies vivo nun dependas .....De l' atingo de la maro. ; Tien do la tuta aro. – .....Ĉiuj naĝas dum momento... ; Poste regas mort-silento. ....

'132 Traboparto nun lasita, ; Ne entute bruligita, .....Por la trio nun flosilo, ; Tre bonvena vivsavilo. – .....La plendinda dej jen dronas; Dik' ankoraŭ lin admonas. ....

## **,&16. Kiel la vojaĝo sur la trabo sukcese finiĝas:**

'133 Jen flosadas nun la trio ; Dolĉe for en kompanio. – .....Fine ĉe la horizonto ; Ho feliĉo! Ŝip' savonta! .....Ĉiam pli ĝi proksimiĝas, ; La espero pligrandiĝas. ....

'134 Baldaŭ venas nun boato, ; Kiu, en plendinda stato .....(Pro malvarmo ili tremas) ; Ilin al la ŝipo remas, ..... Kie ili – bona sorto – ; Nun savitaj de la morto. ....

'135 Sed virin' ne estas rano... ; Jen Ursula pro malsano ..... Dum semajno jam enlita ; Reŭmatisme turmentita, .....Dum frateto, amodanke ; Ĉiam sidas ŝiaflanke. ....

'136 "Kruĉjo", ĝemas ŝi dolore ; "Se ci amas min tutkore, .....Tiam volu min promesi, ; Se mi mortos, ne forgesi ..... Ke ci lasos la kaptadon, ; La frenezan kolektadon." ....

'137 Longkrurul' post tiu vorto ; Iĝis pala kiel morto. .... Do ŝi iras tuj enŝuti, ; Kuracilon por engluti. ....Sed maldolĉa multe pli ; La promeso ja por li. ....

'138 La ronkado lin sciigas: ; Ŝia dorm' sin profundigas, .....Piedfingre li foriras, ; Laŭ ŝtuparo sin eltiras .....Kaj sin tre silenta tenas ; Ĝis li surferdeke venas, ....

'139 Nun surpriz'... ĉielo mia!.. ; Jen la fianĉino lia, .....Staras antaŭ li subite, ; Ĉirkaŭbrakas lin ravite, ..... Krias, kisas... violono, ; Ludas per belega sono. ....

## **,&17. Kiel sinjoro Longkrurulo ree forkuras:**

'140 Penjo krias: "Ho trezoro! ; Restu nun ĉe mia koro! ..... Ni foriru rapidege!" ; Li kapneas malgajege. – .....Prom promeso al Ursulo ; Estas li malfeliĉulo. ....

'141 Tuj ŝi venkas la dilemon, ; Forte vekas lian emon. .... "Ho anĝel' la lando mia ; Estas ejo papilia!" – ..... Nun li ne rezisti povas... ; "Dolĉulin', mi ĉion provas!" .....

'142 Antaŭ ol Ursul' vekiĝas, ; Ĉiu bone nun pretiĝas. .... La ŝipestro – bonfaranto, ; Donas barkon kun remanto, .....Kiu en plej bona ordo ; Ilin portos al la bordo. ....

'143 Longkrurul' kaj Petronela, ; Kun la mopso dika, bela ..... Kaj la gaja muzikisto, ; Ideala por sportisto, ..... Estas gaja kompanio ; Por la rema energio. ....

'144 Post dormado saniganta ; Ursul' estas vekiĝanta. – ..... "Foririnta la fripono!" ; Krias ŝi per laŭta tono. .... "Frato, ĉu vi aŭdas min?" ; Ho, li ne respondas ŝin. ....

'145 Krur' jam estas malproksima. – ; Kun furiozo superlima, .....Ursul' ĉiujn flanken ĵetas, ; Timon en la korojn metas, .....Prenas ŝnuron sen prokrasto ; Grimpas sur la granda masto. ....

'146 Ĵus la barko albordiĝas ; Ĉiuj  
ĝoje surteriĝas .....Kaj nun gaja "La  
espero" ; Ili staras sur la tero. .... Eĉ  
la mopso pro kontento ;  
Kunmurmuras en konsento. ....

'147 Vidas ŝi ke li alvenas, ; Pro  
koler' ne plu sin tenas, .....Kun  
kriego korŝiranta ; Ŝi baraktas jen  
falanta, .....Sed feliĉe: ŝnurligilo ;  
Estas ŝia vivsavilo. ....

## **,&18. Kiel Ursula pro furiozo plendinde trovas sian finon:**

'148 Kiam ŝi malsupren venis, ; Tuj  
la direktilon prenis, .....Forpelita  
direktisto, – ; Kiel lerta ŝipmaristo  
..... Provas ŝi sin albordigi ; Rifojn  
eble eĉ forigi. ....

'149 Sur la rifojn tuj ĵetita, ; Jen la  
ŝipo frakasita, .....Ursul' tion ne  
atendas, ; Ne pro la dronantoj  
pentas, ..... Ne haltadas, sed kuraĝas  
; Al la bord' rapide naĝas. ....

'150 Ankaŭ Diĉjo kun la trabo ;  
Montras sin kuraĝa knabo. .... Ĝi  
nun estas tre bonvena, ; Antaŭsigno  
esperplena, .....Starigante sin sur ĝi,  
; Al la bordo flosas li. ....

'151 Sidas jen la juna paro ; Sur la  
bordo de la maro. .... Sed tuj krias  
Longkrurulo: ; "Ho, jen naĝas ja  
Ursulo!" ..... Ili, plenaj de teruro, ;  
Iras per rapida kuro. ....

'152 Teron Diĉjo nun atingas, ;  
Vive per la brakoj svingas .....Kaj  
kuradas en rapido ; Pro baldaŭa la  
revido. ....Li spiregas tre kaj ŝvitas,  
; Ĉar la trabo post li glitas. ....

'153 Ursula jen alkuradas. ; Oni  
treme atendadas, ..... Staras ja sen ia  
vorto ; Pro la tro fatala sorto.  
.....Kru' similas je mortanto ; Dum  
muzik'... funebra kanto. ....

'154 Ursul' venas; – sed aŭdinta: ;  
Kru' sin estas promesinta. .... Al la  
fremda Petronelo, ; Ŝi jen saltas el  
la felo: .....Kun tondrega bomba  
laŭto ; Ŝi eksplodas el la haŭto. ....

'155 Longkrur' fosas propramane, ;  
Laŭ kutimo tre kristane, .....Por ŝi  
tombon, kun Dikulo – ; Larmoplena  
la okulo. ....Rozojn poste ili ĵetas ;  
Kaj la teron nun remetas. ....

## **,&19. Kiel fine ĉio finiĝas mirakle bone:**

'156 Plue ili nun iradas ; Kien  
Petronel' gvidadas. ....Ĝoje ili  
forpromenas ; Ŝi lin ĉe la brako  
tenas. ....Gaje muzikist' saltetas, ;  
Ĉiuj dolĉe ekridetas. ....

'157 Je la fino de l' vojaĝo, ; Ĉe  
rigardo de l' vilaĝo, .....Nel' kun  
granda karesemo ; Traktas pri  
aparta temo, ..... Kisas, tusas dum  
plorado ; Kaj balbutas post ĝemado:  
.....

'158 "Ve, pri io mi silentis, ; Ĉar mi  
tion multe pentis... ..... Mi... ne tute  
plu... fraŭlino. ; Sed... verdire...  
jam... vid-vi-no... .....Ok infanojn  
mi posedas... ; Tio ja... cin... ne tro  
tedas?" .....

'159 Stranga estas la mieno ; De  
Krurul' ĉe la alveno. .... Sed,  
konante tutan ĉenon ; Kaj la dolĉan  
ĉirkaŭprenon. ....Li ekkriis: "Nu,  
bonege! ; Mi jam amas vin treege!"  
.....

'160 Kaj jen. post feliĉa jaro, ;  
Sceno de l' konata paro. .... Tia  
familia rondo ; Ne plu estas en la  
mondo. ....Meze de l' infanaj krioj,  
; Duarange... papilioj. ....

'161 Dik-amiko kunlloĝadas ; Kaj  
la bubojn instruadas, .... La titolon  
de doktoro ; Li tenadas en honoro,  
..... Kuntrenante – ne malbele – ;  
Sian trabon tre fidele. ....

'162 Ankaŭ la violonisto, ; La fidela  
muzikisto, ..... Ofte venas sen  
prokrasto ; Sin inviti kiel gasto. ....  
Glaso da bongusta vino – ; De l'  
rakonto jen la Fino. ....)